

V-4252/52

(1959)

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA



N-ro 648 (11)

Novembro 1959



Lamenhof-Jaro

**Universala
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)

esperanto

REVUO INTERNACIA

NOVEMBRO 1959

52 a J A R O

N-RO 648 (11)

Fondinto : H. HODLER

Honora Redaktoro : HANS JAKOB

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro :
S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando. Telefono : Rotterdam 128313. Ĝirkonto : 378964
TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

Jara abono (1959) : 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld 1/2 paĝo 64,— gld 1/4 paĝo 32,— gld 1/8 paĝo 16,— gld 1/16 paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estrararo de U.E.A. :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro, Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto : Hans Jakob. Telef. 32.30.34.

LA FRONTPAĜA BILDO PREZENTAS :

La urbodomo de Bruselo, la Kongresurbo 1960.

Enhavo

Forigu la Barojn	181
Utiligo de la Fondaĵo-Zamenhof	181
Ora festo de Teo Jung	182
Esperantologio	182
Esperanto servis por japana filmo	189
Raportoj	197
S.A.T.-kongreso	198

Rubrikoj :

Okaze de la Zamenhof-jaro	183
45-a U.K.	188
CED	190
La juna Vivo	192
Tra la Mondo	193
Esperantista Vivo & Nekrologo	194
Belartaj konkursoj	195
Novaj Libroj	196
La internaciaj konkursoj	198
Oficiala Informilo	198

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

Forigu la Barojn

Unu el la fundamentaj motivoj por esperantisto estas la forigado de baroj inter nacioj, inter rasoj, inter landoj kaj mondpartoj. Kredante, ke la lingva barilo estas granda malhelpilo al interkompreniĝado, li aniĝas al la Internacia Lingvo. Tial la movado devos kapti, dum la venontaj sep jaroj, unikan okazon por montri al la homaro kaj al la fakuloj pri internaciaj aferoj, ne nur, ke ni prave atribuas grandan rolon al lingvaj problemoj, sed ankaŭ, ke Esperanto estas praktika kaj floranta solvo. Mi aludas al la Granda Projekto de UNESKO pri Reciproka Aprezado de Okcidentaj kaj Orientaj Kulturaj Valoroj. Jam dum tri jaroj UNESKO kaj la diversaj registaroj kaj neregistaroj aliĝintaj al ĝi klopodis pri la grandioza dekjara plano por apudigo spirita de la du duonsferoj de la mondo. Ni plenumu la proprajn celojn kaj samtempe pruvu la valoron de Esperanto kiel kultura ilo farante nian parton.

Kiel raportite en la septembra numero de Esperanto, UEA jam vigle okupas sin pri la problemo, planas eldonadon de libroserio kaj plurajn aliajn aferojn kun la celo helpi al ĉi tiu projekto. Jam niaj anoj, S-ino Worcester, S-ino Haudebine, S-ro Sekelj, D-ro Kuwahara, S-ro Choi (prezidanto de Chunggu Universitato) reciproke vizitas Eŭropon kaj Azion, prelegante kaj instruante pri siaj landoj kaj kulturoj. Kompreneble ankaŭ multaj aliaj faras tion, sed mankas spaco por rakonti ĉion. Jam la somera lernejo en Frostavallen dediĉis sin al ĉi tiu temo. Jam oni planas eldoni Ĉinan Antologion, por menciigi nur ekzemplojn de la okazanta agado.

Tamen necesas, ke ni ĉiuj helpu en la laboro por ĉi tiu projekto. Ĉiu homo povos partopreni korespondadon inter oriento kaj okcidento, ĉiu grupo povos aranĝi interŝanĝon de prelegoj, bildoj kaj leteroj kun la alia duonsfero; ĉiu gazeto, ĉu nacia, ĉu pli vasta, povas zorgi ke estu ekvilibro de la enhavo el diversaj kontinentoj. Precipe la gazetoj de la naciaj asocioj povos aranĝi pri interŝanĝo de materialo, kaj mi forte petas al ĉiu, kiu povas helpi en tiaj aferoj, fari tion. Vi helpos duoble al la movado, plenumante la celojn de la lingvo kaj disvastigante scion pri ĝia utilo.

Unu lasta peto, ne faru ĉion sekrete. Grupoj aŭ gazetoj kiuj planas agadon en la senco de ĉi tiu artikolo, nepre informu al la sekretario de la tiucele en Mainz starigita komisiono, Norman R. Smith, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W. 5, Britujo, por ke la faktoj estu plusendataj al UNESKO.

N. R. S.

La Utiligo de la Fondaĵo-Zamenhof

La ĉiumonataj informoj pri la stato de la Fondaĵo-Zamenhof vekis ĉe kelkaj membroj la opinion ke la kolektita sumo certe jam sufiĉas por la celoj, ĉe aliaj la demandon, kio fakte estas farata per la bonhavo de tiu fondaĵo. Al tio ni volonte respondas.

La Baza Programo de la Aranĝoj okaze de la Zamenhof-Jaro, konata al ĉiu leganto per publikigo sur p. 187 de la decembra numero 1958 de "Esperanto", sur pp. 16-18 de Jarlibro I 1959 kaj sur p. 5 de la Jubilea Zamenhof-broŝuro, estas paŝon post paŝo plenumata. Precipe la elspezoj por realigi la punktojn 2, 3, 4, 5, 15 kaj 16 de tiu programo devas esti kovrataj de la Zamenhof-Fondaĵo.

La dokumento, celita en p. 2 estas en Esperanto eldonita, 12-paĝa, en bela formo. Ricevis ĝin senpage ĉiuj individuaj membroj de U.E.A. en 1959. Similan 8-paĝan broŝuron eldonis U.E.A. en angla kaj franca lingvoj kaj sendis al centoj da internaciaj instancoj kaj organizaĵoj.

Ampleksaj serioj de dokumentoj kaj artikoloj, laŭ punktoj 3 kaj 4, estas en Esperanto kaj en angla lingvo larĝe dissendataj en la mondon. Kelkaj el la dokumentoj, nome RDC/6-1, RDC/6-2 kaj RDC/6-3, estas aparte bele eldonitaj kun presita kovrilo. Informoj laŭ p. 5 estas ĝis nun aperintaj en 17 sinsekvaj plurpaĝaj cirkuleroj. La bibliografio, pri kiu parolas p. 15, estas prilaborata kaj eldonota. La memoriĝaj glumarkoj eldonitaj laŭ p. 16, jam estas ĉie en la mondo uzataj. Krom ĉio ĉi, la revuo "Esperanto" aperadas regule kun 20 paĝoj anstataŭ kun 16, precipe por ke estu loko por speciale verkitaj artikoloj kaj informoj pri memorigaj aranĝoj en diversaj landoj.

La materialoj, laboroj, preskostoj, afrankoj por ĉio menciita, estas pagataj el la Fondaĵo-Zamenhof. Krome, estas subvenciata el la Fondaĵo-Zamenhof kiel speciala agado en tiu ĉi jaro, la laboro de S-ino Haudebine en Hindujo.

Laŭ la nuna situacio, post ĉiuj ĉi elspezoj ne ekzistos sufiĉe da mono en la Fondaĵo-Zamenhof por eldoni la planitan Memorlibron laŭ p. 4, kiu tamen nepre devos aperi kiel monumento al la aŭtoro de Esperanto en tiu ĉi Jubilea Jaro. Laŭ provizoraj kalkuloj mankas ĉ 4000 gld. Tial ni petas, ke neniu pensu, ke jam estas plena la kaso de la Zamenhof-Fondaĵo, sed ke ĉiu daŭrigu la kontribuadon same malavare kiel ĝis nun kaj ke multaj novaj donacantoj ekagu!

M. H. V.

APEROS EPOKFARA ELDONAĴO:

Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro

(Detalojn vidu sur p. 200)

Ora festo de Teo Jung

En tiu ĉi jaro de jubileo ankoraŭ unu plia estas menciinda. Ni malkovris, ke eniris la vicojn de la esperantistaro antaŭ 50 jaroj Sinjoro Teo Jung, eldonisto kaj redaktoro de la multlegata Esperanto-gazeto "HEROLDO DE ESPERANTO" !

Baldaŭ post sia esperantistiĝo Teo Jung ekagis en la regiono de sia naskiĝo kaj tie aktivigis la Rejnland- kaj Vestfalian Ligon ("ReVeLo"). Jam frue li ankaŭ montris sian emon al la ĵurnalismo kaj sian kapablon verki artikolojn kaj rakontojn, i.a. en la revueto "Progreso", la organo de "ReVeLo".

En 1920 Teo Jung fondis la semajnan gazeton "Esperanto Triumfonta", kies nomo en 1925 ŝanĝiĝis al "Heroldo de Esperanto". Tiu konata gazeto, kiu donas primovadajn novaĵojn el la tuta mondo al la tuta mondo, daŭre regule aperadis kaj aperadas, nuntempe dusemajne. Ĝi multe kontribuis unue al la aktivigo de la germana movado kaj poste ankaŭ donis instigojn al la internacia movado.

Kiam en la komenco de la tridekaj jaroj la politika klimato en Germanujo fariĝis tro prema por lia laboro, Teo Jung translokiĝis kun sia entrepreno al Nederlando, kie li ankoraŭ nun loĝas en Scheveningen. De tie li seninterrompe ĵetis sian gazeton en la mondon, ofte en malfacilaj cirkonstancoj, ĉar ankaŭ li konas la problemon de abonantoj en nepagipovaj landoj.....

Sed Teo Jung daŭrigis kaj li havas la meriton, ke li jam de jaroj montras al la mondo, ke eblas esti profesia esperantisto, ke eblas vivi per Esperanto, ke vivplenumo, vivocelo kaj vivrimedo povas esti tio, kion multaj eksteruloj supozas nur malgrava ludaĵo. Multajn jarojn li posedas floran tan eldonejon de esperantaj gazeto kaj libroj. Li kombinas komercan senton kun lerta redaktado kaj tiel li donas ĝuste tion, kion liaj legantoj deziras kaj plenumas bezonon de la movado.

Krom la gazeton Heroldo li eldonis ankaŭ plurajn valorajn librojn. El la lastaj jaroj ni citu nur la bonegan originalan verkon "Kredu min, Sinjorino" de Cezaro Rossetti, la tradukon de la konata verko "Tartarin de Taraskono" de la franca aŭtoro Daudet kaj, laste, la tradukon de tiu kortuŝa verkaĵo skuinta la konsciencon de la mondo, la Taglibro de Anne Frank.



Provizi la movadon jaron post jaro per regule aperanta gazeto kaj riĉigian literaturon per valoraj verkoj estas laboro, kiu meritas ĉies dankon. Eble, Teo Jung mem dirus, ke ne estas specialaj meritoj, ke se li ne farus tion, certe alia tion farus, sed tion ni ne kredas. Teo Jung estas Teo Jung kun

ĉio kion li faras kaj skribas. Ni ne vidas, kiu farus ĝin kiel li.

Kompreneble, ankaŭ al tiu ĉi homo — kiel al ĉiu alia, kiu laboras publike — ne mankis atakoj, eĉ ankoraŭ en la lastaj jaroj. Ni ĝojas diri, ke en tiuj okazoj li ĉiam trovis U.E.A. — kiu en 1952 rekonis liajn meritojn per nomigo kiel Honora Membro — senkompromise ĉe sia flanko. Sed ankaŭ en tiu ĉi jubilea momento ni sentas nin ligitaj al li kaj ni esprimas al li niajn plej varmajn bondezirojn. Ke ankoraŭ longe li povu daŭrigi sian laboron kaj ke, flankalflanke, reciproke subtenante unu la alian, ni marŝu al la fina celo !

M. H. V.



GRAVA INFORMO :

Esperantologio reaperos

La grava internacia revuo por la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto nun reaperos per eldono en oktobro de la unua numero de la dua volumo. La interesa enhavo de la 70-paĝa kajero ampleksas artikolon de profesoro W. E. Collinson pri ĝermanaj elementoj en la vorttrezoro de Esperanto, du artikolojn pri la vortfarado de la internacia lingvo, verkitajn de inĝeniero J. Isbrucker kaj d-ro A. Albault kaj daŭrigotan artikolon de D. B. Gregor pri la kondicionalo. Malpli longajn artikolojn verkis profesoro Edm. Privat pri uzado de fremdaj lingvoj, profesoro N. Kawasaki pri la japanoj kaj la esperanta elparolo kaj d-ro Hugo Sirk pri la uzado de "Per" kaj "De". Fine oni trovas ĝisdatajn notojn pri universitataj katedroj de Esperanto.

Esperantologio aperas per kajeroj 48-80-paĝaj formantaj volumojn 250-300-paĝajn. La kajeroj estas eldonataj laŭ la cirkonstancoj, unu volumo kovranta ĉ. 3 jarojn. Jen sekvas provizora listo de perantoj kaj abonprezoj. Kie ĉe lando ne estas indikita kotizo, validas la baza kotizo, kiu estas por la dua volumo 6 us. dol.

Britujo (35 sh) : S-ro M. C. Major, 1, Pembridge Square, London, W. 2. **Ĉeĥoslovakio** : Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, Blanická 4, Praha 12. **Danlando** (35 d. kr.) : Administracio de Esperantologio, S-ro Eskil Svane, Lindegardsvej 28 c, Kopenhago-Chl. **Francujo** (2500 fr.) : Sennacieca Asocio Tutmonda, Avenue Gambetta 67, Paris 20. **Hispanujo** (300 ps) : S-ro V. Hernandez Llusera, Avenida Ejército Español 59, Sabadell. **Hungarujo** : D-ro Bálint Szemenyei, Huba-U. 38, Orosháza. **Jugoslavio** : Slovenia Esperanto-Ligo, Miklošičeva 7, Ljubljana. **Nederlando** (18 gld) : S-ro C. van Essen, Floretstraat 10, Rotterdam 25. **Pollando** : Pola Esperanto-Asocio, ul. Nowy Swiat 27, Warszawa. **Svislando** (22 sv.fr.) : S-ro Otto Walder, Waldmannstr. 10, Romanshorn. **Usono** (6 dol.) : S-ro R. C. Marble, P. O. Box 4127 Van Nuys, California. **Finnlando** (1700 m) : S-ro K. Jokinen, Töölöntulinkatu 7, Helsinki-Töölö, Poŝtkonto 9299.

La Internacia Lingvo kiel Belarta Tradukilo (*)

Okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de

L. L. Zamenhof

verkita por C.E.D. de William Auld

II.

Tiel larĝa estas la kampo de belliteraturo, ke en la kadro de tiu ĉi mallonga studo mi limigos min al konsideroj rilate la tradukadon de poezio. Ĉiu konsentas, ke la tradukado de poezio estas la plej malfacila, kaj se Esperanto montriĝas taŭga por tiu tasko, tre certe neniu dubos, ke por la tradukado de prozaĵoj ĝi estas same taŭga. Tiel do limigante min al la poeziaj verkoj, mi aldonas sube tute mallongan liston el la esperantaj tradukoj, kiuj plene pravas la taŭgecon de Esperanto kiel traduklingvo. Eble necesas ĉi tie emfazi, ke la sola rimedo por konstati la taŭgecon aŭ netaŭgecon de Esperanto sur tiu ĉi kampo estas trovebla, ne en apriora teorumado, sed en studado de reprezentaj verkoj en tiu lingvo. Estas nekredeble, ke oni devas pri tio atentigi, tamen multaj facilanimaj asertoj pri la rolo kaj atingoj de la internacia lingvo plene montras, ke la asertantoj eĉ ne ĵetis rigardon al la literaturo de tiu lingvo! Seriozaj kaj respondecaj personoj estas invitataj studi el la sekvantaj verkoj en ilia esperanta traduko:

UNUOPAJ VERKOJ: *La floroj de l'malbono* de Baudelaire; *Peer Gynt* de Ibsen; *Infero* de Dante; *La bapto de Caro Vladimir* de Karel Havlíček Borovský; *Sinjoro Tadeo* de Mickiewicz; *Eŭgeno Onegin* de Puŝkin; *Tragedio de l'homo* de Madách; *Johano la brava* de Petöfi; *Romaj elegioj* de Goethe; *Poeziaĵoj* de Tuwim; *Socialismo* de Bezimenskij; *Per voĉo plena* de Majakovskij.

ANTOLOGIOJ, k.s.: *Hungara antologio*; *Angla antologio*; *Ĉeĥoslovaka antologio*; *Svisa antologio*; *Eterna bukedo*; *Sveda poemaro*; *El litova poezio*.

Ĉiuj ĉi verkoj, kaj multaj aliaj, brile atestas la taŭgecon de Esperanto kiel poezia tradukilo. La nombro kaj valoro de la ekzistantaj tradukoj estas vere konsternaj, kiam oni pripensas la aktualan situacion en iuj nacilingvaj literaturoj; sed, kiel montriĝos sube, Esperanto havas plurajn gravajn avantaĝojn por la tradukado.

En anglalingvaj rondoj ia konvencio ricevis larĝan disvastiĝon, ke la tradukado de poezio estas eĉ nebla:

"La tradukado de poezio, kiel konate, estas malfacila kaj finfine malebla." (12)

Alia aŭtoro klopodas pravigi tian aserton:

"Mi opinias, ke estas neeble traduki poezion, laŭ la senco de tradukado kiel mi provis ĝin difini. Kompreneble, estas relative facile, se oni havas

(*) La unuan parton de tiu ĉi studo vidu en la oktobra numero de "Esperanto", 1959.

iom da lerteco, la *Tesaŭron* de Roget, rimvortaron, kaj tion, kion mi aŭdacas nomi krucvortema menso, traduki versaĵojn, sed versaĵo ne estas poezio. Ne necesas, ke poezio havu signifon, poezio estas muziko, memsufiĉa, celo en si mem. Senkonsidere pri signifo aŭ eĉ gramatiko, vorto aŭ grupo de vortoj povas per la sono kaj misteraj asocioj krei unikan kunfandiĝon de sentuma kaj spirita spertoj, kiujn povas analizi eĉ ne la teĥnikoj de la psikologiaj kritikistoj. Ĉar la poeto uzas vortojn alie ol la prozverkisto; vortoj por li estas koloroj, eroj en sonmozaikoj, bruoj celantaj veki dormetantan memoron je revivigo de aferoj supozeble mortintaj kaj forgesitaj. Tian aferon oni povas pritrakti nur laŭ ĝiaj propraj premisoj, kaj eble rezultiĝos *simila* mozaiko aŭ kanto, kiu eble havos similan efikon, sed ĝi ne estos traduko, same kiel muzikaĵo verkita por hobojo ne estas la sama kiam ludas ĝin klavceno, kvankam la notoj estas la samaj". (13)

Tiu ĉi mistikismo, estu permesite diri, estas grandparte sensencaĵo. Vere, ke la poezio (kiel ĉiuj lingvaj kreaĵoj) estas profunde subtila kaj posedas "misterajn" asociojn — kvankam tiuj ekzistas, ne en la poezio mem, sed en la mensoj de la homoj ĝin kreinta kaj leganta (sed malofte ĉe ambaŭ samtempe kaj samgrade), kio, kiel montriĝos sube, estas tute alia afero — sed aliflanke *neniu* traduko, ĉu proza ĉu poezia, povas esti alia ol similaĵo: temas nur pri la grado de simileco. Sufiĉe multaj sukcesaj poemtradukoj ekzistas por pruvi, ke la grado povas esti ne malpli alta ĉe la poezio ol ĉe la prozo. (Cetere, mi defias la aŭtoron de la supra alineo menciigi eĉ unu serioze taksindan poemon, kiu ne havas signifon!)

Tamen la atenta leganto tuj rimarkos, ke, se oni akceptas la neeblecon traduki poezion, el tio sekvas, ke ne valoras eĉ entrepreni ĝian tradukadon; ke sekve de tio oni kontentiĝas per proza parafrazo, kio multe malŝargas la dorson de la tradukanto; kaj ke, plifaciligante la celon, oni nepre malaltigas la kvaliton de la atingo. Deklarinte la neeblecon de fidela traduko, oni ne bezonas honti aŭ pardonpeti pri fuŝa! Tiu sinteno povas foje konduki ĝis la plej absurdaj konkludoj:

"Sekve ne nur estas eble, sed kelkrilate pli dezirinde, transdoni Iliadon, Odiseon, aŭ Beŭvulfon proze, ol traduki ilin verse. VERSOJ, KIUJ NE ESTAS POEZIO, MALKLARIGAS LA RAKONTON, kaj sekve la poemon, ne donante adekvatan anstataŭaĵon por la stilo de la originalo." (Mia majuskligo, W.A.)

La aŭtoro ne klarigas, kiamaniere versoj, ĉu aŭ ne poeziaj, kondiĉe ke ili legiĝas flue, povas malklarigi la rakonton! Oni devus konkludi, ke li ne legis la rakontojn de Chaucer (14), se tio ne estus evidenta absurdaĵo! Sed parolante pri la poezia lingvaĵo de *Beŭvulfo*, la sama aŭtoro diras plue:

"Tiuj vortprovizo kaj esprimmaniero kreas la specialajn belon, riĉecon kaj komplikecon de la anglosaksa poezio..... Kaj ĝi kreas la ĉefan malfacilecon je kontentiga tradukado de iu anglosaksa poemo. Ezra Pound (15) sukcesis per sia mirinda kaj fama versio de la *Marvaginto*....." (16)

Do, kvankam Pound jam pruvis, ke oni povas sukcese fari poezian tradukon de anglosaksa poemo, nia aŭtoro tamen obstine elektas fari prozan version. Kompreneble, li ne estas poeto, kaj "ni devas akcepti la fakton, ke ne tre multaj laborantaj tradukistoj estas kreaĵ artistoj; se ili estus tiaj, ili kreus originalajn artaĵojn kaj ne tradukus" (17). Malgraŭ la evidenta fakto, ke traduki poemon kapablas nur poeto, kaj la pruvita fakto, ke tradukoj far poetoj estas ofte altnivelaj, tio ne detenas la nepoetojn de tiaspeca tradukado, nek de la aplomba asertado, ke la tradukado de poezio ne eblas! Kiel refreŝige estas, legi trafan analizon pri la kaŭzoj de tiu ĉi bedaŭrinda situacio fare de alia angla aŭtoro!:

"La tradukado de poezio, precipe la antikva poezio, postulas lertecon treege similan al tiu de ĵonglisto. Per certa mano kaj ŝajna senpeno la koloraj pilkoj de signifo, aludo, formo, sono kaj ritmo devas esti ĵetataj kaj kaptataj. En Anglujo, kie oni ĉiam tre alte estimadis diletantojn, ekzistas tendenco forregali la lertaĵon kiel neeban. Niaj tradukantoj elektas unu-du pilkojn, kies ekbrilo ekplaĉas al ili, kaj lasas la ceterajn forruliĝi al la planklumo (18), klarigante, ke ili retenis la sole gravajn." (19)

Li pravas. La decida faktoro en tradukado, la sola kondiĉo por ĝia "ebleco" aŭ "neebleco", estas la talento de la tradukanto. Anekdotoj povas tion illustri: Amiko mia provis konvinki lernejestron pri la meritoj de Esperanto. "Bone", diris la lernejestro (konfesinde, iom stulte!), "se vi sukcesos traduki en Esperanton la vortludan versaĵon:

Ben Battle was a soldier bold,
And used to war's alarms;
But a cannon-ball took off his legs,
So he laid down his arms,

mi konsentos, ke la internacia lingvo estas taŭga traduklingvo. Nia franca profesoro jam certigis al mi, ke estas neeble traduki ĝin en la francan." Mia amiko trovis solvon, ne nur por Esperanto, sed ankaŭ por la franca! — ĉar, kiel li klarigis al la lernejestro, la traduko de vortludoj dependas, ne de la lingvo, sed de la sprito de la tradukanto. (Bedaŭrinde, tiuj efemeraj traduketoj jam delonge perdiĝis, sed mi memoras, ke la solvo en ambaŭ lingvoj dependis de la duobla signifo de la vorto

"membro".) Tiel same, la tradukado de poezio dependas de la genio de la tradukanta poeto.

Kelkfoje oni aŭdas, ke iu lingvo, aŭ lingvo entute, "kapablas" aŭ "ne kapablas" fari tion aŭ alion. Tia aserto implicite ignoras la fakton, ke lingvo per si mem nenion signifas. Signifon donas al ĝi la homoj, kiuj ĝin uzas:

"La plimultaj vortoj uzataj eĉ de primitivuloj havas nenian rekoneblan similecon al tio, kion ili signas. Ili estas tute *konvenciaj*; tio estas; signifoj devas esti donitaj al ili artefarite per ia subkomprenata konsento inter anoj de la socio, kiu uzas ilin." (20)

Tio ĉi fariĝas tute evidenta, kiam la ŝlosilo de la konvencioj perdiĝas, ekz-e: ĝis la retrovo de la Roseta-ŝtono, kiu ebligis ekvaciigon de konvenciaj signoj de unu lingvo kun tiuj de alia (t.e., tradukon), la lingvaĵo de la antikvaj egiptoj havis nenian signifon por la modernaj homoj. Kompreneble, ankaŭ la *sonoj* de fremda lingvo havas nenian signifon por la homoj ĝis ili ellernis la konvenciajn signifojn, pri kiuj interkonsentas la uzantoj de tiu lingvo. Lingvo, do, posedas nur tiom da signifo, kiom al ĝi donas la homaj mensoj. Se mi uzas la anglan vorton *incarnadine*, la plimultaj "edukitaj" britoj tuj pensas pri unu fama verso de Ŝekspiro, kaj tiu vorto do havas por ili tiun "asociecon" (kvankam estas dubinde, ĉu tio multe aldonas al ilia kompreno de ĝia "signifo"); sed se mi diras ĝin al mia loka buĉisto, estas cent ŝancoj kontraŭ unu, ke li eĉ ne komprenos min, ĉar li ne "lernis" tiun vorton, kaj neniam legis Makbeton. Kaj eĉ en edukita rondo, se al iu ĉarma virino, kiu invitas min sidiĝi apud ŝi, mi respondas:

"Ordonu via donas tian ravon,
ke ĝin obei *tuj* jam ŝajnus *tarde*", (21)

estas tre verŝajne, ke eĉ en ŝia subkonscio ne vekigis rememoroj "mortintaj kaj forgesitaj" pri la kunteksto, kiun havas tiu versparo en la verko de Dante. Okazos certagrada paneo de interkomunikigo.

Sur la kampo de poezio, tio signifas, ke la "kunfandiĝo de sentuma kaj sprita spertoj" estas "mistera" nur pro tio, ke ĉiu homa menso estas altgrade unika, kaj ke la lingvaĵo de poezio, *kiam ĝi estas uzita por komuniki ion malprecizan*, estas mem tre malpreciza; tiel ke la grado de poezia komunikigo dependas ĉefe de la grado de simpatio inter la menso de la poeto kaj la menso de la koncerna leganto. La tuta tradicio, el kiu leviĝas la literaturo kaj al kiu ĝi aludas, ekzistas, kiel dinamisma forto, nur en la mensoj de la homoj hodiaŭ vivantaj, kaj ne en la lingvo mem: ambaŭ daŭre ŝanĝiĝadas. Kiam la poeto Gray skribis:

Fair Science frowned not on his humble birth,
And Melancholy marked him for her own,

la vortoj *science* kaj *melancholy* havis konvenciajn kaj asociajn signifojn ne tute samajn, kiel ili havas

hodiaŭ; tiun fakton devas lerni ĉiu leganto, aŭ li sufiĉe grave miskomprenos la versojn.

Tamen tradicio ekzistas, kaj la lingvo ja posedas rekonatajn kaj rekoneblajn signifojn, subsignifojn kaj asociecojn. Kaj neniu povas dubi, ke la sumon de tiuj pli plene konstatos homo, kiu uzis la koncernan lingvon ekde la infanaĝo kaj vivis kaj edukigis en la medio de la koncerna lingvo, ol homo, kiu ĝin eklernis jam kiel kreskinto, kaj kiu pasigis la pliparton de sia vivo en alia lingva medio. Tiu ĉi senduba fakto donas al Esperanto unu el ĝiaj du gravaj avantaĝoj kiel traduklingvo. Nacilingvaj tradukoj estas preskaŭ ĉiam farataj de homoj el la dua supra kategorio, t.e., de homoj, kiuj tradukas en la gepatran lingvon el lingvo malpli perfekte posedata. Tiu situacio estas tiel ĝenerala, ke ĝi estas implicita en ĉiu studo pri la tradukado, ekz-e: "la tradukanto devas decidi, kio estas la signifo de la frazo, kaj poste esprimi tion *en sia propra lingvo*" (mia kursivigo, W.A.). (22) La esperantaj tradukoj, male, estas ordinare farataj de homoj, kiuj denaske posedas la originalan lingvon kaj tradukas en lingvon, kiun, pro ĝia gramatika ordec kaj semantika precizeco, *ili povas regi same perfekte kaj senmanke kiel sian denaskan lingvon*. Sekve tiuj tradukantoj scias, ĝis plejeble perfekta grado, almenaŭ la sumon de tio, kion ili devas redoni en la internacia lingvo. Tio estas jam granda avantaĝo: ili plejeble "sentas" la originalon.

Duan avantaĝon ĝuas Esperanto rilate la transdonon de asociecoj kaj nuancoj. Forta esperanta tradicio, lingva kaj literatura, jam ekzistas; dum la periodo de unu normala homvivo kaj eĉ pli, la lingvo estas daŭre uzita, — praktike oni nun parolas pri la "tria generacio" de esperantistoj, — granda literaturo originala kaj tradukita estas kreita, kaj kompreneble la esperantaj vortoj jam posedas nuancojn kaj asociecojn indiĝene esperantajn. Ĉiu uzanto de Esperanto devas konscii pri la ekzistanta pezo de tradicio, kiu forte influas lian propran uzadon de la Internacia Lingvo. Tamen Esperanto ne estas, kaj ankoraŭ dum jarcentoj ne povos esti, tiel rigida kiel la naciaj lingvoj. Tradukante el nacia lingvo en alian nacian lingvon, oni trairas du stadiojn: oni studas la vorton aŭ frazon en la originala lingvo, konstatas ĝian precizan signifon kaj la asociecojn, kiujn tiu vorto aŭ frazo kunportas; kaj poste oni klopodas trovi vorton aŭ frazon en la traduklingvo, kiu havas precize saman signifon kaj asociecojn. Sed trovinte la plej taŭgan ekzistantan solvon, oni tro ofte konstatas, ne nur, ke mankas al la traduko kelkaj el la originalaj asociecoj, sed ankaŭ, ke la tradukvorto aŭ frazo alportas kun si asociecojn el sia propra medio, kiuj tute ne necesas aŭ taŭgas por traduko de la originalaĵo. Eĉ pli, oni ne malofte trovas, pro la noveco aŭ ekstrema fremdeco de la originala temo, ke la traduklingvo tutsimple ne posedas la rimedojn por ĝin esprimi:

"Eĉ en lingvoj havantaj riĉan tradicion tiurilate la formado de terminaro ofte troviĝas en la manoj de la tradukanto, kiu ne ĉiam kapablas plenumi sian respondecon tiurilate, kaj kiu ne ĉiam eĉ konscias pri ĝi." (23)

Ekzemplojn de tio prezentas en multaj lingvoj la terminaroj de psiĥologio, marksismo, k.a., kies terminoj eniris tiujn lingvojn pere de tradukoj.

Nu, kvankam la signifoj de la esperantaj radikoj estas ĝenerale klaregaj kaj precizaj, kun tamen kelka algluiĝo de asocieco, pro la gramatika strukturo de la lingvo la tradukanto povas *ĝuste pro tio* redoni kun altgrada precizo la nuancojn de originala teksto. La sistemo de sufiksoj kaj vortkunmetado ebligas atingi altan nuancecon. La vortkunmetado, kompreneble, ne okazas arbitre kaj kaprice, sed laŭ la spirito kaj kutimoj de la lingvo; tamen ĝi donas al la semantiko de la lingvo samtempe grandan elastecon kaj precizecon.

Estas notinde, ke eĉ en la plej simplaj, ĉiutagaj kuntekstoj Esperanto, pro sia relativa manko de antaŭkondiĉado, kapablas esti pli fidela ol tiu aŭ alia nacilingvo. (23a) En la simpla frazo:

"— Vi staru interne, muelistino! Ni tuj bezonos vin — ekkriis Emesiz." (24) por la vorto *muelistino* tute simple ne ekzistas ekvivalento en ekzemple la angla lingvo, nek ekzistas en tiu lingvo tradicia esprimo per kiu oni alparolas ĝuste muelistinon, tiel ke angla traduko devus ignori tiun nuancon.

Agrabla kaj utila rezulto de la altgrada fleksebleco, elasteco kaj precizeco de Esperanto estas tio, ke ĝi bonege adaptiĝas al la apartaj ecoj de la plej diversaj lingvoj. En rilato al la poezia stilo, tio multe helpas al tradukado fidela, kiel laŭ la senco, tiel ankaŭ laŭ la formo. Francajn aleksandrojn, ekzemple, oni kutime tradukas en angla lingvo per kvinjamboj, kaj inverse; Esperanto bonege akceptas ambaŭ versojn, tiel ke aleksandrojn oni tradukas per aleksandroj, kaj kvinjambojn per kvinjamboj, kaj en ambaŭ okazoj ne sentiĝas ia "fremdeco". Krom tio, la lingvo posedas multajn kvalitojn, kiuj altgrade taŭgigas ĝin kiel tradukilon, kaj, antaŭ ol transiri al konsiderado pri kelkaj konkretaj tradukekzemploj, estos utile ĵeti almenaŭ supraĵan rigardon al nur kelkaj el ili.

La akuzativa finaĵo *-n* certgrade liberigas la vortordon de Esperanto. Akuzativo ekzistas en ĉiuj lingvoj, sed ĝi povas esprimiĝi laŭ du manieroj: aŭ ĝi esprimas la objekton sen fonetika morfemo, per la nura pozicio de la vorto en la frazo; aŭ ĝi tion faras per iu fonetika morfemo, kiu povas esti deklinacia, prepozicia aŭ postpozicia (25). Aparte, ante al la dua grupo, Esperanto ĝuas konsiderindan liberecon de la vortordo, kiu ebligas per ĝi reprodukti senperforte multajn stilajn apartaĵojn de la aliaj lingvoj, kio ne estas ebla por lingvo havanta pli rigidan vortordon. Plue, la akuzativo multe kontribuas al la klareco de Esperanto, kion povas mallonge pruvi unu-du ekzemploj:

Il insulta le président plus violemment encore que l'orateur précédent (ĉu tio signifas: li insultis la prezidanton eĉ pli krude, ol la antaŭa oratoro — aŭ — ol la antaŭan oratoron?); *je trouvais ce fruit délicieux au cours de mes longues promenades* (ĉu: mi trovis tiun frukton bongustan dum miaj longaj promenadoj — aŭ — mi trovis tiun frukton bongusta dum...?); *il avait dans la terre une somme enfouie* — La Fontaine (ĉu: li havis monon enfositan en la tero — aŭ — li estis enfosinta monon en la tero?).

Estas utile, aldoni al tio ankaŭ jenon:

"Oni probable kontraŭdiros, ke, se tiuj frazoj estas efektive dusencaj.... tamen la ĉirkaŭteksto permesas ilin senerare kompreni. Tio estas ofte vera, sed ne ĉiam; kaj oni devas konfesi, unue, ke ĉiam ekzistas la risko, ke tiu ĉirkaŭteksto mankas aŭ mem ne estas sufiĉe preciza por eviti ĉian konfuzon; due, ke ekzistas aparte gravaj tekstoj — filozofiaj, juraj, sciencaj — ĉe kiuj subtilo de la penso nepre postulas, ke ĉia eĉ plej malprobabla dubo estu sisteme eliminata." (26)

Al la stila fleksebleco de Esperanto kontribuas ankaŭ la akordiĝo, laŭ nombro kaj kazo, de adjektivoj kun siaj substantivoj. Tio ebligas multajn stilajn apartaĵojn kaj koncizaĵojn, tre efikajn precipe en poezio. Tri mallongaj ekzemploj devas ĉi tie sufiĉi; sed se oni imagas la adjektivojn sen akordiĝo, oni komprenos la esencan gravecon de la afero:

- (i) Mi sidis riverborde kaj, mizera,
Stelecajn lampojn sur la pont' rigardis;
- (ii) Lampgutoj falis al la frunt' malvarma:
Ŝi viŝis ilin per la haroj, larma.
- (iii) La robon blankan ruĝa bend' trastriis.

La precizeco kaj klareco de la internacia lingvo rezultiĝas de multaj faktoroj. Bedaŭrinde oni povas ĉi tie doni nur malgrandan listigon de ankoraŭ kelkaj el ili:

(a) La ebleco senpere verbigi substantivojn kaj adjektivojn, adjektivigi substantivojn kaj verbojn, k.s.

(b) La lasta uzado de la adverbo. La supra ekzemplo (i) liveras belan ekzemplan per la vorto *riverborde*.

(c) La sistemo de sufiksoj. Vidu, ekzemple, la distingon inter *soleca* kaj *solema*.

(d) La refleksiva pronomo *si*. Ekzemple: *Him Kleon bandaged with strips torn from his tunic* (ĉu: Lin Kleon bandaĝis per strioj ŝiritaj de lia tuniko — aŭ — de sia tuniko?).

Fine, la formfidelan tradukadon de poeziaj verkoj multe plifaciligas la altgrada rimriĉo de Esperanto. La rimeblecoj varias de lingvo al lingvo, ekz-e:

"Jen kelkaj vortoj pri la specialaj problemoj de tradukado el la ĉeĥa en la anglan. Kun escepto eble de la litova, la ĉeĥa estas hodiaŭ la plej altgrade fleksia lingvo de Eŭropo, eĉ pli ol la rusa. La

angla, aliflanke, estas la malplej fleksia eŭropa lingvo. En la ĉeĥa, sekve, vortoj kiuj ne rimas en nominativo eble rimas en aliaj kazoj; similaj aŭ identaj sufiksoj povas okazigi rimojn, k.t.p..... mallonge, rimebloj estas senfine pli multnombraj en la ĉeĥa ol en la angla." (27)

Esperanto estas tre riĉa je rimoj (28) — oni povas diri, ke neniue esperanta vorto estas nura balasto en la rimvortaro, kaj cetere la rimeblecoj estas tre variaj — kaj tio kompreneble ebligas reprodukti eĉ komplikajn originalajn rimskemojn, kiel ekz-e de sonetoj, spenseraj strofoj, tercinoj, k.t.p.

Ankaŭ unu plian necesajon ĝuas Esperanto: ĝi allogis al si multnombro poetojn geniajn kaj talentajn, kiuj dediĉis sin interalie al la tradukado en la internacian lingvon de poemoj el siaj plej variaj nacilingvoj.

Ĉio ĉi certigis, ke Esperanto estas neniel mal-supera al la naciaj lingvoj kiel belarta tradukilo.

Daŭrigota

SUBNOTOJ

(12) The Times Literary Supplement, 24.7.1959, p. 436.

(13) L. W. Tancock: Style in translation from French. (Aspects of translation, Londono, 1958, p. 49).

(14) Geoffrey Chaucer (1340?-1400?): granda angla poeto, kies ĉefverko estas la "Rakontoj de Canterbury".

(15) Ezra Pound: nuntempa usona poeto.

(16) David Wright: Beowulf. Londono, 1957. Enkonduko, p. 21-23.

(17) Leonard Forster: Translation, an introduction. (Aspects of translation, Londono, 1958, p. 24). La dua parto de nia citaĵo estas bela nekonsekvencaĵo: multaj kreaĵ artistoj en multaj landoj ankaŭ tradukas; kaj la sperto de multaj el ili donas fortajn motivojn por la aserto, ke la tradukado estas bonega evoluigilo kaj ekzercilo, pri kiu devus de tempo al tempo okupiĝi ĉiu poeto.

(18) Kompreneble, teatra metaforo.

(19) Peter Green, en recenzo en "The Observer" (Londono) ĉirkaŭ decembro 1956, pri libro, kiu mem bele atestas la "eblecon" de poezia tradukado, nome "Translating Horace" de J. B. Leishman.

(20) Prof. V. Gordon Childe: What happened in history. Londono, 1942, represo de 1950, p. 11.

(21) Dante: *Infero*, II, 79-80.

(22) Leonard Forster: Translation, an introduction. (Aspects of translation, Londono, 1958, p. 12).

(23) Verk. cit. sub (22), p. 9.

(23a) La subtilajn kaptilojn, kiuj embuskas la tradukanton, bele ekzemplas jeno: "En 1936 la sama Internacia Instituto de Intelektua Kooperado eldonis francan tradukon de hajkoj de la japana poeto Baŝo, faritan de Kuni Macuo kaj de Steinilber-Oberlin. Unu el ili, plej kortuŝa, tekstis:

*Au soleil, on sèche les kimonos.
Oh ! la petite manche
de l'enfant mort !*

Je la suno oni sekigas la kimonojn. Ho ! la maniketo de la mortinta infano !). Estis rezervite al esperantisto, s-ro Teruo Mikami, kaj al la esperanta revuo 'Oomoto' (N-ro 217, Jul. 1958) riveli, ke tiuj tri versoj entenas kvar miskomprenojn : ĉar en la aludita tempo oni *aerumas* la kimonojn *en la ombro*, ĉar *kosode* signifas ne 'manikon', sed 'malvastmanikan kimonon', ĉar fine la *mortinta infano* estas efektive 'mortinta junulino'." (Prof. G. Waringien, "Lingvo kaj Vivo", p. 418.)

La mondo festas la centjaran datrevenon

El ĉiuj partoj de la mondo alvenas ĝojigaj informoj pri la festado de la centjara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. Nur post la finiĝo de la Zamenhof-Jaro estos eble ricevi kompletan bildon pri ĉio, kio estas farita tiuokaze. En la nuna momento jen nur kelkaj pliaj el la plej interesaj informoj :

Artikoloj. — La nombro de jam publikigitaj artikoloj pri Zamenhof estas vere konsiderinda. Ĉiutage alvenas en la C.O. aŭ en la oficejon de CED eltranĉaĵoj kun artikoloj pri Zamenhof. Kelkaj ekzemploj : la artikolo de Prof. Privat aperis nur en Danlando en 21 gazetoj kun eldonnombro de ĉ. 150.000 ekzempleroj; aliaj artikoloj pri Zamenhof aperis en Danlando en pliaj 123.000 ekzempleroj; ĝis la fino de julio en Italujo aperis 115 artikoloj pri Zamenhof; la artikolo de Prof. Lapenna publikigita ĝis nun en dudeko da gazetoj kaj revuoj, inter la aliaj en la grava revuo "Palatino", revuo pri artoj kaj kulturo, en la organo de la Belga Socialista Partio "Le Peuple" k.a.; en septembro tuta aro da artikoloj kaj informoj en la norvegaj gazetoj okaze de la granda festo en Oslo; en Francujo multaj artikoloj precipe en la provinca gazetaro; la revuo "Bibliothèque de Travail", ilustrita, dediĉis sian tutan numeron de julio al la centjara datreveno; artikoloj pri Zamenhof aperis ankaŭ en gazetoj kaj ĵurnaloj de Japanujo, Indonezio, Vietnamo, Koreo kaj aliaj aziaj landoj; D-ro Borovečki, nun en Etiopio, publikigis du artikolojn en la amhara lingvo (tio estas la unuaj artikoloj pri Esperanto iam publikigitaj en tiu lingvo). Entute ĝis nun, laŭ la proksimumaj taksoj, aperis en la tuta mondo ĉ. 4.000 artikoloj kaj informoj. Oni atendas multe pli grandan nombron en novembro kaj decembro.

UNESKO pri Zamenhof. — La publikaĵo de UNESKO "UNESCO-Features" aperigis en sia n-ro 336 de la 27-a de julio artikolon pri Zamenhof de Françoise Niederhausen tre bonan. En la angla lingvo ĝi havas la titolon "Zamenhof — la Patro de Esperanto", dum en la franca lingvo la sama

(24) Ivan Vazov : Sub la jugo. Esperanta traduko de "Pod igoto", Sofio, 1959, p. 31.

(25) Vd. Prof. G. Waringhien : La akuzativo en Esperanto, (Esperantologio, vol. I, p. 33-52), el kiu mi ĉerpis miajn ekzemplojn pri tiu temo.

(26) verk. cit. sub (25), p. 41.

(27) E. Osers kaj J. K. Montgomery : Modern Czech Poetry. Londono, 1943, p. 11.

(28) Pri la rimriĉo de Esperanto vidu : Malgranda Revuo, 1951, n-ro 1, p. 14-15, kaj 1952, n-ro 1, p. 21-22.

artikolo estas titolita "Por la Unueco de la Homaro — la Verko de Zamenhof". La artikoloj estas skribitaj surbaze de materialoj liveritaj de CED. "UNESCO-Features" estas sendata de UNESKO al miloj da gazetoj tra la mondo.

Japana Radio. — Prof. Hideo Yagi faris tri prelegojn : unu germanlingve por transmara disaŭdigo kaj du en la japana lingvo.

Poŝtmarkoj. — Pollando eldonis du poŝtmarkojn : unu de 60 gr. kun la surskribo "L. L. Zamenhof Aŭtoro de Esperanto 1859-1917" kaj alian de 1,50 zl. kun la subskribo "1959 - Jubilea Jaro de Zamenhof".

Zamenhof-ŝipo. — En Split (Jugoslavio) estis enmarigita granda pola ŝipo, kiu ricevis la nomon "Zamenhof" kaj de nun portos ĝin sur ĉiuj oceanoj kaj maroj, de unu lando al alia. La ceremonio okazis la 12-an de julio kaj ĝin ĉeestis, inter la aliaj, la ambasadoro de Pollando en Beograd.

Libro pri Zamenhof. — En Varsovio estas ĵus publikigita grava verko de Maria Ziołkowska sub la titolo "D-ro Esperanto". La verko estas originale skribita en la pola. Isaj Dratwer faris la esperantan tradukon. Ĝi aperis en ambaŭ lingvoj, tiel ke sur la paraj paĝoj estas presita la Esperanta teksto, kaj sur la malparaj la pola. Eldonnombro : 8.000 ekzempleroj. Multaj fotoreproduktaĵoj. Bindita, 335 paĝoj. Recenzo en unu el la sekvantaj numeroj.

Sciencaj revuoj kaj gazetoj. — Pluraj studoj jam aperis en diversaj sciencaj revuoj, ekzemple en "Problemy", popular-sciencia pola revuo eldonata en 100.000 ekzempleroj (art. de Isaj Dratwer); en "Japana Medicina Ĵurnalo", gravega scienca publikaĵo (art. de Prof. Seiho Nishi); en la "Memoriga Tezaro" de Koreo (art. de Hong Hyeong Eui) k.a.

Ornamaĵoj en parkoj. — En kelkaj britaj parkoj la loka esperantistaro sukcesis aranĝi florbedojn indikantajn la centjaran datrevenon. Tiaj florbedoj estis aranĝitaj en la parkoj de Oldham, Blackburn kaj Leicester. La bele aranĝitaj florbedoj, ĉiuj kun la verda kvinpinta stelo, la vorto "Esperanto" kaj la indiko -1959 vekis grandan interesiĝon en tiuj urboj.

La Baza Broŝuro en plia lingvo. — La broŝuro kun la bazaj dokumentoj pri la Zamenhof-Jaro kaj la artikolo de Prof. Privat estis publikigita ankaŭ de la Argentina Esperanto-Ligo. Ĝi estas presita kaj tre belaspekta.

Dana eldono de CED/5. — La konata dokumento de CED, kiu enhavas la koncizan studon de Prof. Lapenna pri Esperanto, estas publikigita ankaŭ en la dana lingvo entute en 3.100 ekzempleroj.

Fotoj pri Zamenhof. — S-ro Henk Thien (Nederlando) dum pluraj jaroj kolektis fotojn de Zamenhof aŭ en ligo kun li. La tuta kolekto — certe la plej granda en la mondo — havas ĉ. 160 diversajn fotojn. CED havigis por siaj bezonoj unu ekzempleron de la kolekto. Pluraj el tiuj fotoj estos publikigitaj en la decembra numero de "Esperanto" !

Lokaj festoj. — En pluraj urboj jam okazis Zamenhof-festoj. Laŭ la ĝis nun ricevataj informoj, sendube la plej brila kaj plej altnivela okazis en Oslo (Norvegujo) la 14-an de septembro. La programo enhavis plurajn muzikajn punktojn kaj paroladojn, inter la aliaj de eksterlandanoj s-roj Ivo Rotkvić, Ejzo Itoo kaj Tibor Sekelj. La ĉefparoladon faris lektoro C. Støp-Bowitz. Ĉeestis pli ol 600 personoj, elstaraj en la kultura kaj socia vivo,

kiuj komplete plenigis la aŭlon de la Universitato.

El aliaj lokaj festoj aparte menciindaj estas tiu okazinta en Helsinki en la Solena Salono de la Universitato, dum kiu parolis Prof. D-ro Paavo Ravila, Membro de la Akademio de Finnlando, kaj la festo de la 30-a de septembro en la Koncerta Domo de Stockholm. Tiun lastan ĉeestis ĉ. 400 personoj kaj parolis la konata lingvisto Prof. Collinder.

Granda festo en Kopenhago. — La 15-an de decembro okazos en Kopenhago granda publika aranĝo, al kiu estas invitataj ankaŭ Prof. G. Canuto, prezidanto de U.E.A. kaj Prof. I. Lapenna, ĝenerala sekretario. Oni atendas, ke la aranĝon partoprenos, inter la aliaj eminentuloj, kelkaj ministroj. La programo entenas ankaŭ muzikajn punktojn, paroladojn de s-roj Prof. Lapenna kaj Prof. Canuto. Post la aranĝo estos bankedo, kiun sekvos granda balo. Oni atendas, ke tiun aranĝon vizitos ankaŭ multaj esperantistoj el aliaj danaj urboj, el suda Svedujo kaj norda Germanujo. Survoje al Kopenhago Prof. I. Lapenna parolos en la Zamenhof-festoj de diversaj urboj, inter kiuj Brugge, Antwerpen, Den Haag, Arnhem, Essen, Dortmund, Hamburg.



45-a Universala Kongreso de Esperanto

Bruselo - 30.VII — 6.VIII.1960 - Belgujo

Sub la Alta Protektado de
L. M. Baŭduino, Reĝo de la Belgoj

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 1 Oktobro 1959

Kotizoj :

Ĝis la 31-a de decembro 1959 validas la jenaj kotizoj :

- Kongresano 450.- b.fr.
- Edzino de kongresano 225.- b.fr.
- Junul(in)o ĝis 20 jaroj kaj studentoj 150 b.fr.

Pagoj :

La kotizo devas esti pagita ĉe la kongresaj Perantoj, ĉe U.E.A., ĉe la kongresa konto ĉe la kongresa konto ĉe la "Banko de Bruselo" aŭ ĉe la poŝtgirkonto n-ro 1776.71 "Universala Kongreso de Esperanto" Bruselo. Aliĝiloj sen samtempe pago ne estas traktataj.

Adreso :

La koresponda adreso de la Loka Kongresa Komitato estas : "45-a Universala Kongreso de Esperanto — Bruselo — Belgujo".

Telegramoj :

La telegrafa adreso de la Loka Kongresa Komitato estas : "Esperanto Bruselo".

Baza artikolo :

Lokaj Esperanto-societoj aliĝintaj al Landaj Asocioj povas mendi kaj senpage ricevi bazan artikolon pri Bruselo kun akompana bilda materialo, por informaj vesperoj dediĉitaj al la Kongresurbo.

1-a bulteno :

La 6-paĝa elegante eldonita 1-a Bulteno de la Universala Kongreso, kun bildoj pri Bruselo, listo de Perantoj kaj provizora programo estas senpage ricevebla, kune kun aliĝiloj ĉe la Landaj Asocioj aŭ ĉe la kongresa oficejo.

Glumarkoj :

La dukoloraj kongresaj glumarkoj kun la kongresa emblemo estas aĉetebla ĉe la Landaj Asocioj, ĉe U.E.A. aŭ ĉe la kongresa oficejo je la prezo de 30 b.fr. por 3 folioj de po 25 markoj.

Antaŭkongreso :

La oficiala Antaŭkongreso okazos en Arnhem (Nederlando) de la 27-a ĝis la

29-a de julio '60 kun jena provizora programo :

Merkrede, la 27-an de julio : alveno de la partoprenantoj. Vespere : agrabla kunesto.

Ĵaŭde, la 28-an de julio : aŭtobusa ekskurso en la ĉirkaŭaĵo de Arnhem kaj vizito al la naturparko "Hoge Veluwe" kaj Van Gogh-muzeo. Vespere : vizito al la provinca domo kaj kultura vespero.

Vendrede, la 29-an de julio : vizito al foiro en la urbo; akcepto flanke de la urbestro, rondveturado tra Arnhem. Vespere : vizito al la pavilono en "Sonsbeek".

Sabate, la 30-an de julio : forveturo al Bruselo.

Honora protektanto :


Lia Moŝto Baŭduino, Reĝo de la Belgoj, akceptis esti la Honora Protektanto de la 45-a Universala Kongreso de Esperanto.

Statistiko :

(ĝis fino de septembro) Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 4, Belgujo 61, Brazilo 5, Britujo 10, Bulgarujo 5, Ĉeĥoslov. 1, Danlando 4, Finnlando 1, Francujo 12, Germanujo 5, Hispanujo 2, Hungarujo 1, Italujo 6, Japanujo 3, Jugoslavio 6, Kuvaito 1, Maroko 1, Monako 3, Nederlando 5, Norvegujo 3, Novzelando 1, Pollando 11, Svisujo 5, Urugvajo 1, Usono 1. Entute 160 el 27 landoj.

G. C. Fighiera,
Konstanta Kongresa Sekretario

Esperanto servis por japana filmo



"LA STURMO DE JOHANO ARIMA"

En la supre nomita filmo, farita de la reĝisoro Daisuke Itow, unu el la plej konataj, pluraj dialogoj estas parolataj en Esperanto, kvankam ilin parolas iuj "iberianoj", kaj sekve kelkaj povus kredi tiun la "iberia lingvo" mem.....

ESPERANTO EN LA ROLO DE NACIA LINGVO

Iberia lingvo oni faris la internacian en la filmo, ĉar en kies scenario, de la granda reĝisoro mem, aperas kelke da gravaj personoj el tiu Reĝlando Iberio, en la respektivaj roloj de "generalgubernatoro", "kapitano", "oficiro", kaj ceteraj; kvankam originale verkita, la scenario estas tamen fikciita laŭ certa afero, kaj kies konsekvencoj el la jaro 1609, kiuj okazis en iu havenurbo, tiama teritorio de certa regno en Eŭropo, kaj ekster Nagasaki; do la aŭtoro ne volis uzi ankaŭ la lingvon de tiu nun ekzistanta lando, tiom pli, se li jam anstataŭigis ĝian nomon per Iberio, pro skrupulo pri eventuala protesto de la koncerna regno. Sed, kiam kunsidis la stabo de la filmo, ne venis glate konkludo pri la tikla problemo, kiun lingvon do adopti, el la parencaj....; daŭris tiel longe, ĝis fine iniciatis uzon de Esperanto s-ro Nobuo Miura, la estro de Kioto-Studio de la kompanio Dailei, kaj produktisto de la nova filmo, kaj tion konsentis tuj la reĝisoro Itow, ĉar kiu per si mem ja havis la ideon, sed nur ne proponis, opiniante ĝin tamen tro originala en la kazo. Nun, ambaŭ jam decidis la feliĉan ideon iel realigi, spite fortan kontraŭstaron de pri la internacia lingvo ne informitaj sinjoroj.

Tiam s-ro K. Tokuda, la koncerna propagandisto okaze menciis pri la entrepreno kaj ĝia malfacilo al asistprofesoro Tadao Umesao, kaj estis surprizita aŭdi, ke ankaŭ la lasta estas esperantisto. Tiel laŭ la peto de la stabo, s-ro Umesao tamen sin turnis al s-ro Miyamoto M., la sekretario de Kansai

Ligo de Esperanto-Grupoj, konsiliĝi por trovi deziratan kunlaboranton; el tio sekvis, ke li en la nomo de KLEG rekomendis min kiel servanton por la tasko, ĉar loĝanta en Kioto mi estus oportuna i.a. pro la neceso frekventi la studion.

Kelkaj diris, ke Esperanto en la filmo aperas pli, ol kiom ili supozis. La reĝisoro Itow esprimis, ke li faris bone kun la adopto de Esperanto en sia filmo, kaj ankaŭ, ke li estas danka pro la helpo de esperantistoj.

Ĉirkaŭ 50 tagojn mi vizitis al la studio, funkciis kiel la sekretario de la "iberiaj aferoj": mia servo estis deĵori surloke, kiam oni filmis scenojn kun esperantaj dialogoj (kiujn tradukis Miyamoto kaj mi), por zorgi la rolantojn, ke ili povu kiel eble plej bone prononci en la lingvo; sed ĉar mankis tempo anticipe instrui eĉ abocan al la "iberianoj", kiuj konsistis el diversaj nacioj, dungitaj kiel la ekstraj aktoroj por la filmo, la tuta Esperanto-teksto tial ne povis pretendi kiel io modela. Krom tiuj, ankaŭ kelkaj geaktoroj japanaj parolis, kaj apenaŭ pli bone (?), ol la neĵapanoj....

Ĉar la iberianoj, precipe la jenaj personoj ludas la gravan rolon en la historio, nome Don Sebastiano de Matoso, la generalgubernatoro de Ĉu-kjang, Antonio de Kastro, la kapitano de "LA PATRINO DE DIO", kaj Don Mirando, oficiro, sin sekvas multaj scenoj kun ili kaj konsekvence Esperanto-dialogoj, kvankam tiuj ĉi estas ofte nelongaj. Ankaŭ la nomo de la ŝipo kaj la personaj nomoj estas ĉiuj esperantigitaj, dum ili sonis alie en la komenco; se tamen oni povus malfacile rimarki, kio estas skribita jen kaj jen en la dekoroj. En la tuta daŭro de la filmo aŭ 114-minutoj oni ne malofte aŭdas paroli aŭ komandi en iu "Iberia lingvo", kaj devas esti atentaj legi la surimpozojn, kiuj aperas pli ol sepdek foje sur la ekrano.

Se mi skribus detale pri tio, kiel ni devis klopodi kun tiu nekutima tasko, necesus tro granda spaco kaj mi dubas, ĉu ĝi indas aŭ ne, do mi citos jen kelkajn dialogojn en Esperanto; ili tamen ne prezentas la tuton:

Kastro: Haltu! Haltu! Prokraston al la ekzekuto!

Heroldo: Jen urĝa ordono de lia moŝto!

Mirando: Lia generalgubernatora moŝto de Ĉu-kjang, Don Sebastiano de Matoso degnas doni al vi specialan kompaton; se Konsuzu, akuzitino pentos la antaŭan krimon, kaj montros sin humila antaŭ lia moŝto, oni kun aparta konsidero pardonu vin de la mortopuno..... Vi vidas?

Kosuzu: Ne!

M.: Mi konsilas vin penti kaj ricevi lian altan favoron.

K.: Ne! Kaj tiel plu, k.t.p.....

Tacuo Huĝimoto, KIOTO.

CED

Centro de Esploro

kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo
Telefono ARNold 90-81

ESPERANTO EN LA LERNEJO

En la aprila numero de "Esperanto" aperis informo pri la enketoj, kiujn faras CED pere de sia kunlaboranto por lernejoj aferoj, s-ro D. Kennedy, koncerne la geinstruistojn-esperantistojn kaj koncerne la lernejojn, en kiuj Esperanto estas instruata.

La informo estis ripetita en la julia-aŭgusta numero de "Esperanto".

La oficejo de CED ĵus ricevis informon, ke al la enketo A (instruistoj) venis entute 117 respondoj, kaj al enketo B (lernejoj) entute nur 42 respondoj.

Se oni konsideras, ke tre verŝajne ekzistas minimume 2.000 geinstruistoj-esperantistoj kaj ke tute certe en multe pli ol 42 lernejoj Esperanto nuntempe estas instruata, oni komprenos, ke la nombro de respondoj estas pli ol malkompleta. Tiuj ĉi enketoj estas gravegaj pro la paŝoj entreprenotaj post la Zamenhof-Jaro en la lernejoj medioj. Ne estas eble doni iajn detalojn pri la plano en la nuna momento, sed unu el la ĉefaj elementoj de la koncerna dokumentaro estos precize la rezultoj de tiuj ĉi du enketoj.

Tial CED sentas sin devigita plilongigi la limdaton por sendo de la respondoj ĝis la 1-a de januaro 1960. La demandoj, ni ripetas, estas presitaj en la julia-aŭgusta numero de "Esperanto" sur la paĝo 130. Ĉiuj geinstruistoj estas varme kaj insiste petataj respondi per poŝtkarto al la demandaro A, dum ĉiuj profesoroj kaj instruistoj, kiuj instruas la lingvon en kiu ajn lernejo aŭ universitato, estas petataj respondi al la demandaro B. La respondojn oni sendu senprokraste al s-ro David Kennedy, 21 Westfield Road, Bishop Auckland, Co. Durham, Britujo.

Estas espereble, ke almenaŭ nun ĉiu, al kiu estas direktita tiu ĉi alvoko, faros sian devon kaj donos la petitajn respondojn. Efektive temas pri tiel minimuma fortostreĉo — skribado kaj afranko de unu poŝtkarto — ke estas preskaŭ nekredeble, ke estas necese fari tiom da alvokoj kaj direkti tiom da petoj por atingi tian minimuman helpon!

TRI GRAVAJ DOKUMENTOJ

En la lasta tempo CED eldonis, okaze de la Zamenhof-Jaro, tri pliajn dokumentojn en la angla lingvo. La studo de Prof. G. Waringhien "Lazaro Ludoviko Zamenhof" aperis kiel Dok. RDC/6-1. La artikoloj de Prof. I. Lapenna "La Grandeco de D-ro L. L. Zamenhof", de M. Boulton "L. L. Zamenhof-Pionira Poeto" kaj de J. Francis "Integro kaj

Latentoj en la Verko de Zamenhof" estas publikigitaj en la Dok. RDC/6-2. Fine, la studo de Mag. W. Auld "La Internacia Lingvo, kiel Belarta Tradukilo" aperis kiel Dok. RDC/6-3. La studon de Prof. Waringhien kaj la artikolon de Prof. Lapenna tradukis el Esperanto en la anglan la kunlaboranto de CED Edward Ockey. La ceteron tradukis en la anglan la aŭtoroj mem.

ARTIKOLOJ DE CED-KUNLABORANTOJ

Pluraj kunlaborantoj de CED verkis artikolojn okaze de la Zamenhof-Jaro. Kelkaj el tiuj artikoloj aperis dum la tuta jaro en la revuo "Esperanto". Aliaj estis multobligitaj kaj senditaj de la I.F. de UEA al la landaj kunlaborantoj por traduko kaj publikigo en la nacilingvaj gazetoj kaj revuoj. Lastatempe estas tiel senditaj la artikoloj de D-ro A. Mildwurf (Britujo) "L. Zamenhof kaj lia Verko", de Preston Davis (Usono) "Esperanto kaj la Teorio de Komunikado", de C. Støp-Bowitz "Lingvaj Problemoj en Natursciencoj", de D. Kennedy "Esperanto — Heredaĵo al la Infanoj de la Mondo", de Julia Isbrucker "Unu Mondo Unu Lingvo", de Prof. Hugo Sirk "Lingvaj Spertoj en la Praktiko de la Scienco", de D-ro G. F. Makkink "Zamenhof en la Evoluo de la Komunikado", de Rev. F. Moravec "La Internacia Lingvo kiel Familia Lingvo". Multaj el tiuj artikoloj jam aperis en la nacilingva gazetaro. La artikolo de D-ro Makkink vekis tian interesiĝon, ke li estis invitita prezenti persone raporton al sciencista kongreso en Varsovio. Ne petu tiujn artikolojn de CED, sed de via landa asocio aŭ informa fako en via nacia lingvo.

Donacoj

	£	\$	p
La stato de la 26-a de aprilo	37-	4-	0
Gesinoroj Laurie, Britujo	2-	0-	0
S-ro E. P. Crabtree, Britujo	2-	0-	0
Svisa Esperanto-Societo, Svislando	8-	3-	2
Doc. Régulo-Pérez, Kanariaj Insuloj	1-17-		7
N.N. el Rotterdam, Nederlando		7-	2
Prof. Fernández-Menéndez, Urugvajo		7-	1
S-ino Metzer, Francujo		1-	4
S-ro Sikora, Francujo		1-	4
S-ro R. Slot, Nederlando		18-	10
S-ino M. Duncan, Aŭstralio		10-	0
S-ro K. R. C. Sturmer, Britujo		10-	0
S-ro Tom Fraser, Britujo		10-	0
Stato je la 3-a de oktobro 1959	54-	10-	6

Koran dankon al ĉiuj donacintoj.

Kiel oni vidas, en la nuna momento la donacoj al CED por tiu ĉi jaro estas multe malpli grandaj ol en la pasintaj jaroj. Verŝajne tion kaŭzis la fakto, ke multaj personoj, kiuj kutime finance kontribuas por la laboroj de CED, ĉi-jare faris donacojn al la Zamenhof-Fondaĵo. Espereble, tamen, la fidelaj helpantoj de CED ne forgesos, ke precize en tiu ĉi jaro CED plenumis kaj plue plenumas grandegan laboron. Estas ankoraŭ tempo sendi donacojn por tiu ĉi jaro!

Donacojn por CED oni povas sendi al la Centra Oficejo de UEA, 7 Eendrachtsweg, Rotterdam, C., Nederlando; al Unuigo Esperantista Franca, 34 Rue de Chabrol, Paris, X, Francujo; al la ĉefdelegitoj aŭ perantoj de UEA

aŭ al CED rekte je la nomo kaj adreso de ĝia Direktoro, 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Britujo.

Statistiko pri eminentaj fakuloj-esperantistoj

Komence de 1958 s-ro E. Malmgren turnis sin al CED kun la sugesto kolekti informojn pri eminentaj lingvistoj, kiuj estis aŭ estas esperantistoj. La enketo devis rilati ne nur al vivantaj lingvistoj-esperantistoj, sed ankaŭ al mortintaj. CED akceptis la sugeston, sed opiniis, ke estus utile fari pli larĝan enketon, kiu koncernus ne nur lingvistojn, sed entute elstarajn personojn sur la kampoj de scienco, edukado, kulturo, politiko, artoj kaj ĝenerale publika vivo. Tiun gravan taskon CED transdonis al sia kunlaborantino por statistikoj, s-ino Emilija Lapenna el Zagreb (Jugoslavio). Ankaŭ tiu statistiko apartenis al tiuj multnombraj laboroj, kiujn CED entreprenis por helpi al kiel eble plej digna festado de la Zamenhof-Jaro.

S-ino E. Lapenna perfekte plenumis sian taskon kaj sendis al la oficejo de CED detalan raporton kun ĉiuj necesaj aldonaj dokumentoj. Se la rezultoj de la enketo ne estas tiel kontentigaj, kiel ili estus povintaj kaj devintaj fariĝi, ne estas ŝia kulpo, sed kulpo de tiuj, kiuj donis nenian helpon.

Surbaze de la raporto de s-ino E. Lapenna estas donataj jenaj koncizaj informoj :

La demandfolioj (Demf-EE-1958), provizitaj per klaraj instrukcioj, estis senditaj al la landaj asocioj en aprilo 1958 kun la peto, ke ili prizorgu la respondojn fare de la eminentuloj, loĝantaj sur ilia teritorio, kaj resendu ilin al la komisiito de CED. La organiza plano estis aranĝita simple kaj praktike. La respondoj povis esti proksimumaj, se ne estis eble doni precizajn. La landaj asocioj povis mem plenigi la demandilon por ĉiu mortinta eminentulo, sed ankaŭ por la vivantaj, se ili mem ne emis fari tion.

La statistiko rilatis nur vere elstarajn fakulojn : universitatajn profesorojn, verkistojn, artistojn, politikistojn, ekleziajn kaj armeajn altrangulojn kaj similajn, kiuj akiris renomon de eminenteco ekster la Esperanto-Movado, kaj ne al personoj, kiuj fariĝis elstaraj nur en la kadroj de la Esperanto-Movado. Pro la lastatempa trouzo kaj ofta misuzo de la vorto "eminenta", la demandiloj kaŭzis komence ian konfuzon, kvankam la instrukcioj estis tute klaraj ankaŭ rilate la difinon de la vorto eminenta por la bezonoj de tiu ĉi statistiko.

Post pluraj petoj kaj admonoj jenaj landaj asocioj reagis : Brazila, Brita, Bulgara, Dana, Finna, Franca, Germana, Hispana, Jugoslavia, Norvega, Novzelandaj, Pola, Svisa, Urugvaja kaj Esperanto-Ligo por Nordameriko. El la nealiĝintaj asocioj donis helpon aŭ almenaŭ iel reagis Ĉeĥoslovaka Konsulta Komitato, Helena Esperanto-Asocio, Esperantista Ligo Izraelanda kaj Hindujo (ankoraŭ sen asocio).

Sendis eĉ ne unu respondilon kaj reagis eĉ ne per unu vorto al la leteroj kaj admonoj jenaj landaj

asocioj : Argentina, Aŭstralia, Aŭstria, Belga, Flandra, Itala, Japanaj, Maroka kaj Sveda.


La demandiloj estis senditaj ankaŭ al la nealiĝintaj landaj asocioj, sed ili, eble, diference de la aliĝintaj, ne estas subigitaj al la morala devo plenumi la petojn de CED, kiujn ĝi direktas en la intereso de la plua progresigo de Esperanto. La Ĉeĥoslovaka Konsulta Komitato rifuzis sendi la demandilojn al siaj eminentuloj. Tamen, unu respondo venis en Ĉeĥoslovakio pro klopodo de privata persono. Ekzistas landaj asocioj, kiuj informis, ke la "sekretario faris nenion rilate la statistikon". Aliaj sur simpla poŝtkarto skribis kelkajn nomojn de siaj eminentuloj, sen iaj ajn pliaj indikoj.

Evidente, en tiaj kondiĉoj kaj kun tiaspeca emo helpi al grava enketo, kies rezultoj estus povintaj fariĝi unuaranga materialo por efika dokumentado en iuj medioj, la enketo ne povis sukcesi. Entute venis 126 respondoj, kio prezentas tro malgrandan materialon por povi fari ĝeneraligojn. Tamen, eĉ tiel manka, la enketo estas multrilate instrua. Jen kelkaj konkludoj surbaze de la ricevitaj respondoj :

El iuj vivantaj eminentuloj-esperantistoj, 98% estas viroj kaj 2% estas virinoj. Laŭ la aĝo 9% estas sub 40 jaroj, 24% estas inter 40-50 jaroj, 24% inter 50-60, 29% inter 60-70 kaj 14% estas pli ol 70-jaraj. Laŭ la profesio 60% estas universitataj profesoroj aŭ docentoj, 7% estas verkistoj aŭ artistoj, 8% politikistoj, 4% armeaj aŭ ekleziaj gravuloj, 21% aliaj eminentuloj. El ĉiuj eminentuloj nur 31% estas organizitaj membroj de la Esperanto-Movado, 16% estas aktivaj esperantistoj kaj 53% neaktivaj.

Surbaze de la respondoj oni povas fari ankaŭ aliajn analizojn, ekzemple pri la fakoj de la eminentuloj, pri la libroj verkitaj de ili, pri la ordenoj kaj aliaj distingoj, kiujn ili ricevis, k.t.p. Tamen, la menciita analizo kaj ĉiuj aliaj analizoj devas esti prenitaj kun grandaj rezervoj pro la tro malgranda disponebla materialo. Unu rezulto, kiu certe fidele respegulas la faktan staton, estas la malalta procento de eminentaj fakuloj, organizitaj kaj aktive partoprenantaj en la Esperanto-Movado. La Esperanto-societoj kaj la aliaj Esperanto-organizaĵoj devus nepre klopodi altigi tiun procenton, altiri kiel eble plej multajn eminentajn fakulojn al aktiva partopreno en la laboroj de la Esperanto-Movado. Nuntempe, kiam la Esperanto-Movado faras bonajn progresojn ĉie en la mondo kaj kiam la ĝenerala kultura nivelo altiĝas, estos pli facile aktivigi eminentajn personojn en la Esperanto-Movado. Siavice, ilia aktivigo donos grandan helpon al plia disvastigo de la lingvo kaj al kreo de pliaj kulturaj valoroj en ĝi.

CED esprimas publikan dankon al ĉiuj landaj asocioj kaj unuopuloj, kiuj helpis en la enketo. Ĝi esprimas speciale koran dankon al sia kunlaborantino, s-ino Emilija Lapenna, pro ŝia vere granda laboro kaj faka gvidado de la enketo.



LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Ivo Osibov

Tuŝkanova 21/III, Zagreb, Jugoslavio

NOVAJ ORGANOJ DE TEJO

Dum la 15-a Internacia Junular-Kunveno okazinta ĉisomere en Gdańsk, la Komitato elektis novajn organojn de TEJO. La Novan Estraron eniris :

Prezidanto: **Günther Becker**, Schlossbergstrasse 51, Blieskastel-Saar, Germanujo;

Vicprezidantoj: **Marek Pietrzak**, ĉe Pola E-Junularo, Garncarska 18, Gdańsk, Polujo; **Richard Reuchlin**, T 6/18 Mannheim, Germanujo;

Generala sekretario: **Nicola Minnaja**, Viale Giulio Cesare 223, Roma, Italujo;

Kasisto: **Adriaan Den Haan**, Athjestraat 2, Leiden, Nederlando;

Redaktoro: **Ivo Osibov**, Tuŝkanova 21/III, Zagreb, Jugoslavio;

Estraranoj: **Nikolaj Nikolov**, ĉe Junulara sekcio de la Bulgara E-Asocio, poŝkesto 44, Sofio, Bulgarujo; **Heinrich Reiter**, Sonnwendgasse 32, Wien X, Aŭstrujo.

La Arbitracia tribunalo konsistas el: **Wim Bruynesteyn** (Nederlando), **Anastas Ĉalakov** (Bulgarujo), **Vincenzo Di Nubila** (Italujo), **Ljubiša Jevtić** (Jugoslavio) kaj **Gerhard Ziegler** (Germanujo).

Ankaŭ estas elektitaj komisiitoj: por disvastigo de Esperanto inter la ekster-eŭropa junularo **Lucien Piétri** (Afriko) kaj **Kwatliat Kho** (Azio), pri junularaj vojaĝoj **Hans Bakker**, filo, kaj pri interŝanĝo de junularaj grupoj **Svobdan Zlatnar**.

Esperantista Renkontiĝo dum la VII-a Monda Junulara Festivalo

Dum la VII-a Festivalo, kiu okazis de la 26-a de Julio ĝis la 4-a de Aŭgusto en Vieno, la ĉefurbo de Aŭstrio, ankaŭ okazis ree Esperantista Renkontiĝo, kies prezidanto estis la TEJO-estrarano Heinrich Reiter. De la nuna TEJO-estraro krome estis reprezentita s-ro Nikolaj Nikolov, prezidanto de la Bulgara Esperanto Junularo. Post streĉaj antaŭlaboroj de la festivala Komitato kiel ankaŭ de la Aŭstria kaj Bulgara Esperanto-Junularoj, la Esperantista Renkontiĝo ree fariĝis bona sukceso. Partoprenis geamikoj el 12 landoj en kvar kontinentoj (mankis Afriko). El la riĉa programo mi mencias nur la solenan malfermon kun festparolado de inĝ. Simeon Simeonov el Sofio, la prezenton de kvar filmoj en Esperanto, la gajan vesperon k.a. En laborkunsido ni interalie decidis jenan

REZOLUCION:

1. Nuntempe la defendo de la paco

en la tuta mondo estas la plej grava tasko de la junularo. La plivastigo de la kulturaj, profesiaj, turistaj kaj personaj kontaktoj de la diversnaciaj gejunuloj kontribuas al la paca kunvivado de la popoloj.

2. Esperanto estas facila kaj neŭtrala rimedo por efektivigo de rektaj kaj senperaj kontaktoj inter la diversnaciaj gejunuloj. Pro tio ni apelacias al ĉiuj junularaj internaciaj kaj naciaj organizaĵoj helpi la disvastigon de Esperanto en la junularaj medioj.

3. Por forigo de lingvaj baroj dum la estontaj festivaloj oni devas prizorgi grandskalan aplikadon de Esperanto.

4. Ni proponas al Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kunlabori pli aktive kun ĉiuj internaciaj kaj naciaj junularaj organizaĵoj rilate la disvastigo kaj apliko de Esperanto, plifaciligo de internaciaj junularaj rilatoj k.s.

La detalan programon kaj ĉiujn festival-aktualajn informojn oni povis legi en la jam tradicia antaŭfestivala gazeto "Esperanto en la FESTIVALO", kiun eldonas la Bulgara TEJO-Sekcio. La por ni esperantistoj de la festival-komitato luitaj salonoj kaj kinejo estis grandegaj kaj modernaj, la en Esperanto presitaj invitiloj plaĉaj. Geinteresuloj pri kunlaboro en venontaj festivaloj aŭ instigantoj bonvolu interrilati kun la festivalkomisiito de TEJO, s-ro Nikolaj Nikolov, Poŝkesto 44, Sofio, Bulgario. Ni esperu, ke la venonta festivalo estos ankoraŭ multe pli granda sukceso por Esperanto.

Heinrich Reiter

INTERNACIA SEMINARIO DE LA GERMANA ESPERANTO-JUNULARO

Inter la 27-a de Decembro 1959 kaj la 2-a de Januaro 1960. Germana Esperanto-Junularo organizos tradicion Internacian Seminarion, ĉifoje sub la titolo "Aziaj kaj Afrikaj problemoj". La Seminario okazos en la junulargastejo de Limburg/Lahn sub la honora protektado de la urbestro, s-ro Josef Schneider.

La programo konsistos el prelegoj kaj sonbendaj raportoj de diverslandaj esperantistoj pri la seminaria temaro, el Zamenhofa soleno, diskuto pri la esperantista junularo, film- kaj lumbild-prezentadoj, surbendigo de raportoj pri la seminario, ekskursoj kaj silvestra balo.

Pro ŝtata subvencio la prezo (enhavanta loĝadon kaj ĉiujn manĝojn) estos nur 40 GM por gepartoprenantoj

malpli ol 25-jaraj kaj 50 GM por pli ol 25-jaraj. Parto de la vojaĝkostoj (ĝenerale 50%) sur la linioj de la Germana Federacia Fervojo estos repagata al la gepartoprenantoj malpli ol 25-jaraj.

Por plifaciligi organizan laboron partoprenantoj estas petataj aliĝi kiel eble plej baldaŭ ĝirante la antaŭpagon de 10 GM al la konto n-ro 9750 ĉe Stadtparkasse Neustadt-Weinstrasse por Deutsche Esperanto-Jugend. Aliĝilojn oni povas ricevi de la Germana Esperanto-Junularo, Mannheim, T 6/18, Germanujo.

5-a Internacia Junulara Skiferio de TEJO

3-a Internacia Junulara Skikonkurso de TEJO

1-a Eŭropa Vintro-Universitato

La skiferio kun skikonkurso kaj Vintro-Universitato okazos de la 26-a de Decembro 59-a ĝis la 5-a de Januaro 60, en la pensiono "Reithof", Filzmoos, Salzburg, Aŭstrio. La aranĝo komenciĝos per la vespermanĝo kaj finiĝos per la tagmanĝo (dek plenaj tagoj!).

La prezo por loĝado kaj manĝado estas por la tuta tempo 480.— aŭstr. ŝilingoj, por ok plenaj tagoj 400.— ŝilingoj. Pli longa resto eblos je reduktita prezo. Aliĝojn ni nur povos akcepti ĝis la unua de decembro. Laŭeble ĉiu junulara Esperanto-klubo (grupo) sendu reprezentant-in-on. Gejunuloj el pluraj landoj jam aliĝis. Antaŭpagon (180.— ŝil), informpetojn (kun respond-kupono) kaj aliĝojn direktu al: Heinrich Reiter, WIEN X., Sonnwendg. 32/2/33, Aŭstrio.

Gejunuloj (teen- twenty- and thirty-agers), ne gravas, ĉu Vi estas ĉampionoj aŭ kompletaj novkomencantoj en la skiado, Vi havos multajn eblojn por agrable pasigi la tempon. Venu, Vi certe estos kontentaj!

H. R.

SEKVINDA EKZEMPLO

Diversaj internaciaj kunvenoj, konferencoj, kongresoj kaj aliaj aranĝoj estas lokoj de unuaranga graveco por nia agado. Bonegan ekzemplon donis ĉisomere la "Esperanto-Junularo de Berlino".

En Berlino okazis tendumado de la "Internacio de socialista junularo" (IUSY), kiun partoprenis ĉirkaŭ 5.000 gejunuloj el 33 landoj. La Esperanto-Junularo de Berlino bone eluzis la sancon informante pri Esperanto dum ĉiuj 10 tagoj en la tendaro. Meze de la tendaro ĝi sukcesis akiri grandan tendon por organizi malgrandan ekspozicion, disdonadi varbilojn kaj vortarojn kaj diskuti pri la problemoj de internacia lingvo. Entute estas disdonitaj 5.000 kvinlingvaj varbiloj speciale eldonitaj por ĉi-okazo, 3.000 seslingvaj faldfolioj kaj alia materialo. La laboro de la berlinaj junuloj vekis grandan intereson inter la partoprenantoj, vizitantoj kaj gazetaro.

Tra la Monda

Danlando

Jam dum jaroj Vibenshus lernejo, Kopenhago, interŝanĝis infandeseĝnaĵojn kun multaj landoj per Esperanto kaj ankaŭ okazis ekspozicio en la lernejo. Nun Direkcio por Kopenhagaj Komunumaj Lernejoj donis 1000 danajn kronojn por enkadrigi la plej belajn el la infanverkoj. Ili trovos lokon en la klasĉambroj.

Car oni volonte refreŝigos la konstantan ekspozicion de tempo al tempo, oni petas al interesitaj geinstruistoj interŝanĝe sendi infandeseĝnaĵojn aŭ skulptaĵojn el argilo al Roma Thorsen, Vibenshus Skole, Strandboulevard 147, Kopenhago.



★

La komunuma biblioteko en Kopenhago dumtempe havas ekspozicion de Esperanto-literaturo. La ekspozicio estas inspirita de la informoj, kiujn dissendas Sven Ziegler al la danaj tagjurnaloj.

★

Dum ĉi tiu vintro juristo Eskil Svane, sekretario en la Ministerio por eksterlandaj aferoj, instruas Esperanton en la Universitato en Kopenhago unufoje semajne.

Germanujo

La bela Esperanto-prospekto de Wuppertal estas havebla ĉe: Presse- und Werbeamt Wuppertal, Germanujo. Prefere jam nun kaj Esperantlingve petu pri ĝi.

★

La Hungara Realgimnazio en KASTL, Germanujo, havas inter la gelernantoj Esperanto-rondeton, kiu tre vigle laboras. Ĝi eldonis pasintjare 11000 Esperanto-glumarkojn por propagandi la gimnazion kaj samtempe Esperanton, kaj la glumarkoj estas haveblaj ĉe: Ungarisches Realgymnasium, Kastl bei Amberg/Opf., Germanujo. Skribu rekte al la direktoro, d-ro J. Kondor, kiu mem estas fervora esperantisto. Ekzemple li prizorgas, ke la Esperanto-Rondeto por plifortigi la ekonomion de UEA ĝis nun sendis pli ol 2000 uzitajn

poŝtmarkojn al s-ro P. Zacho. Li petas geesperantistojn sendi salut- kaj kuraĝigajn leterojn aŭ poŝtkartojn al la Rondo sub la menciita adreso.

★

En la ŝtata Mezlernejo Burglengelfeld la direkcio pasintan aŭtunon decidis enkonduki Esperanton en la kadro de la libertempa okupado. 20 gelernantoj, 13-15 jaroj partoprenis. Je la fino de la lernejjaro kontente konstatiĝis, ke la rezultoj atingitaj pravigas la rekomendojn de komprenemaj gepatroj kaj edukistoj, ke la kulturministro laŭforte subtenu la enkondukon de Esperanto en la lernejojn. En la jarraporto de la lernejo aperis longa artikolo pri tiu ĉi grava progreso rilate al la edukado al vera humanismo.

Hungarujo

La Junulara Fakrondo "Zamenhof", Budapeŝto kaj "Ligo de Esperantistaj Foto-Filmamatoroj (I.L.E.F.) komencis fervoran kampanjon por disvastigi Esperanton kaj por aktivigi siajn novajn anojn. Tiucele ili dissendis diversajn cirkulerojn al multaj Esperanto-organizaĵoj por peti helpon rilate al kontakto kun grupoj de kolektantoj kaj Foto-filmamatoroj.

★

Laŭ alvoko de la Internacia Organiza Komitato je honoro de la Zamenhof-festjaro kaj laŭ aranĝo de la klubo "Konkordo" s-ro Pál Balkányi faris Esperantan fakrondon en Budapeŝto dum la somero. Li vizitis 12 tendarojn kaj parolis antaŭ proksimume 1000 geknaboj pri la vivo kaj verko de Zamenhof laŭ kultura, infankoresponda kaj pacmovada vidpunktoj. Du lokojn li faris lumbildparoladojn kaj en dek lokoj ekspozicion, kiun granda parto de la infanoj kaj de la pedagogoj kun intereso trarigardis. Ĝuste antaŭ 50 jaroj s-ro Balkányi lernis Esperanton.

Pécs. La plej proksima teritoria renkontiĝo okazos ĉi tie en la nunjara aŭtuno.

★

La 1-a Orienthungarlanda Esperanto-Renkontiĝo okazis en Debrecen en la fino de junio, en komuna organizo de Patriota Popolfronto kaj Hajdú-Bihar Departementa Komitato de HEK. Ĝin partoprenis pli ol 200 hungaraj esperantistoj el la tuta lando. La debrecenaj esperantistoj post sia reorganiziĝo antaŭ tri jaroj bone aranĝis ĉi tiun gravegan esperantistan manifestacion. Oni presigis 600 grandajn afiŝojn. Du semajnojn antaŭ la renkontiĝo ili estis videblaj sur ĉiu dua domo de la ĉefstrato, de la stacidomo ĝis la granda arbaro kaj en pluraj tramveturiloj. Estis presitaj krome invitulo,

insigno kaj koverto kun la portreto de Zamenhof. Okaze de ĉi tiu renkontiĝo aperis ankaŭ la plej freŝa numero de "Verda Vojo". La programo estis tre abunda por iom pli ol 28 horoj. Bone sukcesis la ekspozicio vizitita de multaj geurbanoj kaj geamikoj de la Internacia Lingvo. Eĉ speciala poŝtofocejo estis tie. Solena kaj altkvalita estis la tuta programo kun muziko de la Filharmonia Orkestro. Dimanĉe 40 personoj plenumis Esperanto-ekzamenon. Tri fakkunsidoj okazis: Porpaca, Fervojista kaj Virina.

★

Orosháza. Pri la ĉiam tre vigla agado de la esperantistoj en la departementoj Békés kaj Csongrád sciigas la cirkulero "Sudhungarlanda Stelo", i.a. Esperanto-Komitatoj en ambaŭ departementoj fondis Magnetofonan Servon.

★

En Békéscsaba la "Bekeŝa presejo" presis belegan koloran prospekton ankaŭ en Esperanto: "Vizitu Hungarlandon".

★

La gazetoj Csongradmegyei Hírlap kaj Délmagyarország en la printempo multfoje enmetis sciigojn pri Esperanto. La informoj temis i.a. pri la vizito kaj la prelegoj de f-ino M. Boulton, turisma prospekto de Szeged, partopreno en la 44-a UK de Esperanto en Varsovio ktp.

Israelo

Novfondita vegetara naturista kolonio Amirim en la montara regiono apud Galileo bone progresas, kaj ĝi antaŭ nelonge ricevis novajn tre aktivajn membrojn. La revuo "Veterano", eldonita de Amirim, estas havebla kontraŭ 2 respondkuponoj. Ilin oni sendu al I. Dorn, Vegetara Kolonio "Amirim, "Merom-ha' Galileo, Israelo.

Japanujo

En Japanujo nun aperas la trimonata revuo "Al unu popolana Kunhomaro". La revuo estas bele presita kaj sufiĉe interesa. La celo de la eldonistoj estas "rapidigi la novan epokon, por ke ĉiuj povu ĝin vivpartopreni kaj plikompreni". La abonprezo estas: 9 rpk. aŭ \$ 0,60 jare. Eldonadreso: kunhomaro c/o A. C. Blatt, Box 926 Central PO, Tokio, Japanujo.

Tago de la Homaj Rajtoj

la 12-a de decembro

Ankoraŭ havebla estas la belega serio de 12 foto-afiŝoj ĉe la C.O. kontraŭ 4 resp. kup. aŭ egalvaloro.

Japana komitato por la organizo de Zamenhofa Jubileo aranĝis Esperantan libraron kun pli ol 160 ekz., kiujn oni elektis ĉefe el la postmilitaj tutmondaj eldonaĵoj. La migrantan ekspozicion efektivigis la japana komitato por la memoro al 100-jara Zamenhofa Jubileo. La unua prezento de la ekspozicio okazis en Tokio en junio, kaj la vizitantoj (neesperantistoj) superis 2000. Inter ili troviĝis multaj kompetentaj personoj — ankaŭ sciencistoj. Pluraj grandaj ĵurnaloj (unu el ili, Asahi) informis pri la okazaĵo, kaj NHK-Televido uzis la okazon havi intervjuon kun Konĵi Ossaka, prez. de Japana Komitato por la Zamenhof Jubileo.

Jugoslavio

Populara revuo enkondukas Esperanto-kurson okaze de Zamenhof-Jaro. La redakcio de populara kroata revuo "SLOGA" (Konkordo) decidis okaze de la Zamenhof-Jaro denove aperigadi la kurson de Esperanto por la memlernantoj. La revuo siatempe aperigis tian kurson, kaj la kurso vekis intereson ĉe vilaĝanoj, kiuj estas grandparte legantoj de la populara revuo. Nun denove dank' al s-ro Giunio, kiu sukcesis interesigi la novan redaktoron J. Vrhovac por Esperanto, reaperos regule ĉiumonate la Esperanto-kurso. Enkonduka priesperanta artikolo verkita de Giunio jam aperis en la 6-a kaj 7-a numero de la men-ciita revuo.

Nederlando

Arnhem Kunlabor-komitato sukcesis aranĝi Esperanto-kurson en la Arnhem eldono de "Het Vrije Volk". Ĝis fino de septembro sin anoncis pli ol 200 partoprenantoj, kaj la nombro ĉiutage kreskas. La unua leciono aperos en la numero de la 8-a de oktobro.

La tiu ĉi jara Zamenhof-vespero, organizota de la Kunlaborkomitato en Arnhem, okazos marde la 8-an de decembro en salono de "Royal". En ĝi kantos ĥoro de la Instituto por Laborista Klerigado, kaj prelegos prof. d-ro Ivo Lapenna, la ĝenerala sekretario de

U.E.A. kaj la sekretario de la Internacia Komitato por la Zamenhof-jaro, pri "La genio de d-ro L. L. Zamenhof". Ĉiuj esperantistoj estos bonvenaj.

New Zealand

En New Zealand okazis nova oficiala aprobo pri instruado de Esperanto en la elementaj lernejoj. La menciitaj klasoj I kaj II troviĝas aŭ en elementa aŭ en postelementa lernejo kaj enhavas infanojn 11-12 jarajn. La aprobo aperis en nova programo pri la angla lingvo: "... precipe estas sugestate ke en klasoj I kaj II estos pluraj infanoj, kiuj pro apartaj kapableco kaj intereso meritas pluajn okazojn por studi: 1.... 2.... alian lingvon eks. la francan, la maorian aŭ Esperanton. Okazon por studi alian lingvon oni povas ofte doni per lerneja klubo. Grave estas emfazi, ke tiajn klubojn aŭ klasojn gvidas instruistoj kompetentaj pri la lingvo. La lingvistudado probable estos daŭrigata en postelementa lernejo".

Usono

En la komenco de aŭgusto okazis en "Green Acre" Esperanto-semajno por la Bahaanoj kun gastoj. Ĉeestis pli ol 150 personoj de ĉiuj partoj de la lando kaj de Kanado. Ĉi-vespere estis kulturaj programoj, ekz. dum iu vespero oni diskutis la funkciadon de UN, kaj ĉie sur la muroj en la kunvenejo pendis UNESKO-afiŝoj Esperantlingvaj. S-ro Gonzalec faris bonegan paroladon pri la internacia lingvo.

Svislando

Okulisto, d-ro Alfred Bader, Bazelo, informis la 13-an de septembro en prelego en Thun siajn okulkuracistajn kolegojn pri Esperanto por servi al la Zamenhof-jubilea jaro. Liaj helpiloj estis: foto de Zamenhof, poŝtkarto de 1906 de Zamenhof, kelkaj libroj, i.a. kongreslibro de la 44-a U.K. 1959. Fine la ĉeestantoj sendis saluttelegramon por "Prezidanto de UEA, d-ro Giorgio Canuto, direktoro de la Jurmedicina Instituto en Torino.

Esperantista Vivo

Naskiĝo

Gesinjoroj Soňa kaj Vladislav Pečinka, Lázně Jeseník, Ĉeĥoslovakio anoncas la naskiĝon de sia filineto la 15-an de julio 1959. La filineto, Vladislava, estas denaska esperantistino.

Gesinjoroj Margaret kaj Derrick Faux, Wheathill-Bruderhof, Bridgnorth anoncas la naskiĝon de sia fileto, Julian Roy, naskita la 26-an de aŭgusto 1959.

Geedziĝo

BADSTIEBER - FASTL. Je Pentekosto geedziĝis en Salzburg, Austrujo, f-ino Marianne Fastl kaj s-ro Hans Badstieber.

Memortagoj

S-ro Michl Ehbauer, München, konata poeto kaj humoristo, longjara membro-abonanto de UEA, festis la datrevenon de sia 60-a naskiĝtago 30 jaroj kiel esperantistino.

★

En oktobro s-ino Edwarda Kamińska, Gdansk-Wrzeszcz, Pollando, festis la tagon, ke ŝi antaŭ 30 jaroj en la Varsovia Universitato ricevis el la manoj de prof. Otto Bujwid la superan Esperanto-diplomon. De tiu tempo ŝi vigle partoprenas en la Esperantomovado en Pollando kaj gvidis multajn kursojn. Post la mondmilito ŝi estis dum du jaroj en germana koncentrejo, kie ŝi ege suferis. Feliĉe ŝi estis liberigata de la Sveda Ruĝa Kruco. Alveninte en Svedujon ŝi prelegis tie dum 8 monatoj pri la restado en la koncentrejo kaj verkis libreton "En la faŭko de la morto".

S-ro Ivan H. Krestanof, Sofia, Bulgarujo, festis la 28-an de oktobro sian 70-jaran naskiĝtagon.

Nekrologo

Carles Riba, la eminenta kataluna poeto kaj lingvisto, Universitata profesoro, kiu akceptis partopreni la Internacian Komitaton por la Zamenhof-jaro, ĵus forpasis. Li estis nur 65-jaraĝa, kaj prezidis la Filologian fakon de l'Institut d'Estudis Catalans kaj direktis la grandan kolekton de klasikaj Grekaj kaj Latinaj verkaĵoj, "Fundació Bernat Metge", tradukataj en katalunan lingvon. Al lia vidvino, ankaŭ fama poetino, kaj gefiloj, plej sinceran kondolencon.

★

Mortis la fidela esperantisto, longjara membro-abonanto de UEA, s-ro Georg Aschl, München.

★

Kun profunda malĝojo la esperantistoj en Kolarovgrad sciigas, ke la 26-an de julio mortis en Sofia la amata, ŝatata kaj honorata s-ro Ilia Silvestriev Petkov, 76 jarojn aĝa. Li estis pioniro de la bulgara Esperantomovado kaj fondinto de la loka Esperanto Societo "Vekiĝo".



Zamenhof Memortabulo

En Wiener Neustadt, Aŭstrujo, estis inaŭgurata bela Esperanto parketo kaj en ĝi, la 18-an de majo 1959, oni inaŭguris sole ankaŭ Zamenhof memortabulon.

Belartaj Konkursoj 1959

Branĉo : Originala poezio

Unua Premio

*kovreti mian tombon mutan,
kvazaŭ ĝi plorus per neĝaj larmoj.*

Sandor Császár

Intimo

*Kontraŭ mura grizo
de l' eta ĝarden' :
orflava citizo.*

*Karesas blanka man'
abundon floran
en orpluva ban'.*

*Vi ĝoju, kara,
pro riĉa vivoplen'
en hejmo solidara !*

*Sed ŝlosu ĉiujn pordojn bare,
kaj metu dogon ĉe la sojlo :
Ekstere sur ĉeval' de Trojo
rajdas perfide voĉ' najbara.*

Albert Samyn

NOVA TALENTO

*Laŭ malnovgreka-latina versmezuro
kiel ĉe la poemo : "Printempaj burĝonoj"*

Kun neĝ' arĝenta paŝas la vintro

*Ne serĉu ridon, ĝojon sur mia vang',
malbrilaj iĝis miaj okuloj jam,
la flam' de mia kor' flagretas,
ĝia ardenta somer' foriĝis.*

*Ankoraŭ logis ankaŭ hieraŭ min
Amor' kaj plektis koron Li mian per
sangruĝaj rozoj, nia amo
sune brilegis en mia esto.*

*Mil steloj ardis supre en nokt' kaj vi
ĉe pala lum' de l' luno ĵuradis, ke
eterne restos mia suno,
tamen vi baldaŭ ĵurrompis aĉe.*

*Ne serĉu ridon, ĝojon sur mia vang',
vualo nigra kovris malgaje ĝin,
aŭtuno flava kaŝis mian
koron kun kantoj flustrant aj kune.*

*Kun neĝ' arĝenta paŝas la vintro jen
konsoli mian vundon doloran kaj*

Branĉo : Tradukita poezio

Unua Premio

*Esperanto-traduko de la germana poemo : "Ein
alter Herr spricht"*

Parolas Maljunulo

de Erich Kästner

*Infano estis mi. Jes, kiel vi.
Mi estis vir'. Kaj maljunulo nune.
Forpasis temp'. Ankoraŭ vivas mi.
Volonte mi forgesus ĉion kune.*

*Infano kiel vi. Nun elĉerpите.
Tro longa viv' fariĝas fine aĉa.
Se morto venus, bone, aprobite.
Mi estas laca ! Alinome : saĝa.*

*Mi vidis multon en la mondteatro.
Infano estis mi. Jes, kiel vi.
Mi estis viro kiel via patro.
Plejofte malvaloris, kredas mi.*

*Por vi ja estus rakontinda multo,
Ankoraŭ nekonata historie.
Vi serĉus en la libroj sen rezulto,
Ĉar la esenca parto mankas tie.*

*Milito estis. Kaj ni spertis ĝin.
Sufero venis. Kaj ni spertis : kial.
La grandaj trompoj ne plu trompis nin.
Fantome ni ekkonsciiĝis : tial.*

*Esperis ni. Sed vana la espero.
Malforta stelo restis la raci'.
La posteuloj pensis ĝin ĥimero.
La posteuloj lernis ne de ni.*

*Nun venas vi. Maleblas ŝanĝi sorton.
Ne povas helpi mi, deziras morton.
Laŭvole faru ! Sed memoru jen :
Racio ja postulas propran forton,
Stulteco nur ofertas sin sen pen' !*

Horst Michling

Novaj Libroj

Duope ricevetajn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

MEZE EN GERMANUJO — MEZE EN LA 20-a JARCENTO. Riĉe ilustrita libro 80-paĝa en la germana lingvo kun 16-paĝa traduko en Esperanto, eldonita kaj senpage havebla ĉe la Federacia Ministerio por Tutgermanaj Demandoj (Bundesministerium für gesamtdeutsche Fragen) en Bonn.

La interesa libro prezentas per teksto kaj trafikaj fotoj la historion de la zonlimo, 1300 kilometrojn longa, kiun starigis la komunista reĝimo en Orienta Germanujo laŭlonge de la demarkacia linio inter la zonoj, okupitaj de Sovetunio unuflanke kaj la tri okcidentaj potencoj aliflanke. La du partojn de Germanujo unu de la alia disigas hodiaŭ pikildratoj, barieroj, gardoturoj: barita distrikto plurajn kilometrojn profunda, gardata de malgranda armeo nomita en Orienta Germanujo "la limpolico".

La fotoj ilustras per muta elokventeco la sekvojn de la artefarita divido de Germanujo: la detruon de regionaj kaj lokaj ekonomiaj unuoj kaj la paralizon de trafiko kaj komerco en la zonaj randregionoj. Traboj obstakloj, dratoj, fosoj k.s. fermis fervojajn liniojn kaj baras vojojn kaj ŝoseojn, kiuj neuzataj jam ruiniĝas kaj kovriĝas per plantaĵoj.

La libro informas, ke la komunista reĝimo en Orienta Germanujo motivigis la starigon de tiu bariero inter oriento kaj okcidento per la neceso de konstanta protekto kontraŭ agentoj, spionoj kaj sabotistoj en okcidenta Eŭropo. Konsiderante tamen kiom da homoj fuĝas okcidenten ĉiutage, oni ne povas ne demandi, ĉu ĉiuj baratoj, ĉiuj observejoj, ĉiuj gardoturoj ne ĉefe direktiĝas kontraŭ la forkurado kaj elmiĝado sekreta el Orienta Germanujo, kies politika sistemo fariĝis netolerebla.

Senkonsidere pri tio, kiel oni respondas al la farita demando, la recenzita libro kun ĝia fidinda Esperanto-traduko estas tre rimarkinda el la vidpunkto de oficiala aplikado de la Internacia Lingvo, kaj ankaŭ ĉi tiu libro atestas pri la kreskanta signifo de Esperanto por informaj celoj de ŝtataj aŭtoritatoj.

Eskil Svane

LERNOLIBRO DE ESPERANTO. De L. Nimó; presis E. Moreno Medrano, Entenza 131, Barcelona. Prezo: -.65

pesetoj plus sendkostoj.

La sobre impona ekstero de tiu ĉi volumo — ore literumita ŝagrino — sugestias kleran enhavon, la antaŭparolo plifortigas tiun impreson, kaj la lecionoj konfirmas ĝin. Sekve, almenaŭ la hispanoj nun posedas verkon, kiun ili povas prezenti al ĉiu eĉ plej erudicia filistro tute ne devante senti humiliĝon antaŭ ties eventuala supereco, ĉar tiu ĉi libro nenion cedas al antaŭjuĝemaj ŝercantoj, ĉu en sinteno, ĉu en prezento.

La antaŭparolo atentigas, ke la celo de la verko estas "prezenti koncize la mirindan kreaĵon filologan, kiu estas Esperanto", kaj anticipe neniigas facilanimajn argumentojn pri la artefariteco de Esperanto per la analogo de kulturita rozo, kiu estas tamen natura floro. Fine, la aŭtoro atentigas, ke la mirinda simpleco de la lingvo ne signifas, ke oni povas ekkoni ĝin sen iu ajn peno.

Tiu ĉi prudenta kaj science serioza sinteno speguliĝas en la lecionoj mem, kiuj komenciĝinte per prononcolecio, kiu utiligas tuj vortaron lernendan, provas liveri al la studanto plenan, ne tro koncizigitan, scion pri la lingvo per ŝtupoj nur grade kondukantaj al pli malfacilaj niveloj.

La tradiciaj ĉikanoj pri verkoj agnoskitaj kiel kompetentaj estas domaĝaj, sed mi ne povas ne scivoli, ĉu la uzo de 'preferus' en

"Mi preferus se vi venus"
apud frazoj, kiaj

"Mi estus feliĉa se vi venus"
ne estas konfuza por studanto, kiu jam kutimiĝis al "ke" kaj la imperativo ĉe verboj, kiaj "atendas" kaj "deziras", precipe kiam la gepatra lingvo uzas "que" plus subjunktivo sendistinge.

Lerte kompilita korelativa tabelo subtenata de koloneca "I" staras antaŭ la lecionoj, kiel la "skeletono de la lingvo".

J. F.

EKZISTENCIALISTAJ HEROOJ EN LA LITERATURA VERKARO DE J. P. SARTRE*, paralelaj tekstoj esp-a kaj franca ambaŭ faritaj de Colette Llech-Walter, kun antaŭparolo de Prof. Giorgio Canuto. Eldonis Centre Culturel Espérantiste, 5, Quai Vauban, Perpignan (Pyrénées-Orientales), Francujo. Havebla ĉe "UEF-Esperanto", 34, Rue de Chabrol, Paris 10-ème. Prezo:

150 fr. fr. aŭ 4 st. aŭ 4 resp.-kup. 71 paĝoj.

Dum la Universala Esperanto-Kongreso en Marseille, f-ino Colette Llech-Walter, filino de s-ro René Llech-Walter, faris prelegon pri la filozofio ekzistencialista, prenante kiel reprezentanton de tiu skolo la francan verkiston Jean-Paul Sartre.

Jen aperis la raporto de f-ino L. W. en du lingvoj. Dekstre oni legas la francan tekston kaj maldekstre la saman tekston en Esperanto.

Bedaŭrinde la Esp-a teksto estas maleleganta, tro aspektas tradukita, kaj havas eĉ rektajn erarojn gramatikajn, ekzemple erare anstataŭas akuzativo nominativon (p. 30, en la suba citaĵo), nominativo akuzativon (pp. 12, 40, 42), preterito prezencon (pp. 14, 44), adverbo adjektivon (pp. 56, 58).

Sed kvankam la malelegantaj kaj la eraroj iom agacas la leganton, la teksto ja estas komprenebla preskaŭ ĉie. Tamen, sen helpo de la franca paralelo oni apenaŭ komprenus ekz. jenan frazon:

"Li rekunigas tiamaniere, la sintenadon de multaj homoj kiujn estas perfekte persvadataj pri la graveco de sia misio en la socio" (p. 30). La senco estas: "Tiamaniere li akceptas la sintenadon de multaj homoj kiuj estas perfekte pesvaditaj.....".

Estas tre domaĝe ke la Esp-a teksto havas tiajn makulojn, ĉar la enhavo estas vere bona. F-ino L.-W. sukcese atingis sian celon, "esprimi kelkajn ĉefajn ideojn, kiuj tute speciale impresas dum la legado de la Sartra verkaro" (p. 10). Per ekzemploj elektitaj el la beletraj verkoj de Sartre ŝi montras kial Sartre nomas sian filozofion humanismo, kaj kiel laŭ Sartre la plej multaj homoj estas "malliberaj" kaj kiel kelkaj homoj klopodas iĝi liberaj kaj trovi vivon aŭtentike homan. La broŝuro de f-ino L.-W. estas sendube unu el la plej bonaj helpiloj por tiu kiu deziras ekkoni la filozofion de Sartre.

La verkintino diras (p. 14 kaj 15) ke la dana filozofo Søren Kierkegaard uzis unua la terminon "Ekzistencialismo". Sed en kiu loko? En la verko kiu precipe inspiris la modernajn ekzistencialistojn, "Fina Nescienca Postskribo" (1846), S.K. distingas inter pensanto (kaj pensado) ekzistanta, subjektiva, kaj pensanto (kaj pensado) spekulativa, objektiva, kaj en tiu verko kaj aliaj li tre ofte uzas la verbon *exister* 'ekzisti', la substantivon *Existens* 'ekzistado' (kaj tridekon da diversaj kunmetaĵoj kun ĝi), kaj ankaŭ la adjektivon *existentiel* 'ekzistada'; sed mi dubas ĉu S.K. uzis ankaŭ la derivitan substantivon *Existentialisme* (eble ĝin uzas liaj francaj tradukintoj, kiuj foje tradukas la partupon signifantan 'ekzistanta' per *existentialiste*, vorto verŝajne netrovebla en la dana originalo). Sed eble f-ino L.-W. povas indiki la lokon kie S.K. uzas ĝin. Laŭ

prelego farita dum la Kierkegaard-kongreso en Kopenhago en 1955 de prof. Pierre Mesnard (universitata profesoro de la studento Sartre), la unua franca teksto en kiu troviĝas la vortoj *existentiel* kaj *existentialisme*, estas traduko de libro de la hispana filozofo Unamuno, "Pri la tragika sento de la vivo", origine aperinta en 1913. Ĉu Unamuno, kiu trovis la adjektivon *existentiel* ĉe Kierkegaard, aŭ lia franca tradukinto Marcel Faure-Beaulieu) estis la unua kiu de ĝi derivis la substantivon *ekzistencialismo*?

Nu, ne gravas tiu detalo filologia, pli gravas la malbona stilo Esp-a, sed plej gravas ke f-ino Llech-Walter donis al ĉiuj kiuj scias aŭ Esp-on aŭ la francan lingvon, klaran kaj kleran enkondukon en la filozofion de la ĉefa reprezentanto de la ateista ekzistencialismo en Francujo, enkondukon legindan por ĉiu kiu deziras koni sian epokon.

La libreton pri ekzistencialistaj herooj ilustras fotoj, i.a. de prof. Canuto kaj de f-ino Llech-Walter.

Poŭl Skårup

Raportoj

Kunvenoj de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj en Varsovio, la 4-an kaj 7-an de Aŭgusto.

Elstaraj estis la publikaj kunvenoj de I.L.E.I. La unua distingiĝis pro la fakto, ke tiom da geinstruistoj kun aktuala sperto partoprenis por pri-trakti teknikan temon- enhavon de unujara kurso en lernejo. S-ino Roma Thorsen (Danlando) sperte kaj vigle enkondukis. Minimume 155 personoj el 17 landoj partoprenis.

La dua, kiel kutime, pritraktis pedagogian temon por lumigi la situacion nunan rilate la instruistaron. Proksimume 160 ĉeestis el 15 landoj. Resumo de respondoj el 17 landoj farita de la Sekretariino kondukis al vigla diskutado. Dum la tuta tempo ĉeestis reprezentanto de la Ministerio, kiu laŭdis la glatan interŝanĝon de pensoj.

Nome de la Ministro de Edukado li afable salutis la kunvenon, dirante, ke la Ministro alte taksas la valoron de Esperanto aparte por la instruistoj kaj eduko al la lernejoj. Li promesis pli bonajn kondiĉojn por Esperanto-instruado en Pollando. Prof. J. Toczyski tradukis.

Post la kunveno okazis kunveno de polaj geinstruistoj, kiuj faris rezolucion pri rimedoj, kiujn devus uzi Ministro de Edukado por apogi la Esperanto-instruadon en polaj lernejoj. La tekston de tiu rezolucio enmanigis al la Ministro mem en la sama tago gesamideanoj Hodakowski, Juzwowa kaj Toczyski. La Ministro tre favore akceptis la delegacion kaj konsilis prilabori alvokon al ĉiuj lernejestroj interkonsente kun Ministerio. Tiun alvokon la Ministerio mem dissendos al ĉiuj lernejoj en Pollando.

Krom tiu ĉi kontentiga okazaĵo, la Komitato de ILEI kun kelkaj aktivuloj estis akceptita ĉe la Nacia Sidejo de la Pola Instruista Sindikato. Tie la invititoj ariĝis ĉirkaŭ rondaj tabloj, ĉiu kun gastiganto, kaj babiladis laŭ eblaj lingvoj. La Sekretario bonvenigis. La Prezidentino de ILEI, F-ino Dedieu, dankis, kaj esperis, ke la iama Esperanta sekcio restariĝos.

Prof. Toczyski, reprezentanto de ILEI en Pollando estas ja gratulinda pro tiom da sukceso ĉe tiuj altrangaj instancoj.

La KOMITATO de ILEI ESPRIMAS al ĈIUJ MEMBRO-ASOCIOJ, al ĈIUJ UNUOPAJ ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ la DEZIRON, ke ILI ESTIGU aŭ APOGU KLOPODOJN POR HAVIGI ĈE LA RADIO MENCION PRI la CENTJARA DATREVENO de ZAMENHOF-NASKIĜO, kaj ke EN LERNEJAJ KLASOJ aŭ LERNEJAJ MEDIOJ ILI ATENTIGU pri TIU EVENTO.

La membroj-asocioj de ILEI en 1958-59: Aŭstrujo, Britujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Italujo, Japa-

nujo, Jugoslavio, Svedujo kaj Svislando enkalkulas ĉ 2252 membrojn. Krome en Bulgarujo, Hispanujo, Izraelo kaj Usono la statistiko montras 252 geinstruistojn. Entute almenaŭ 2504 en 14 landoj. Laŭ informoj de niaj reprezentantoj estas minimume 207 lernejoj kursoj en 16 landoj, kun ĉ 6616 gelernantoj ĝis aĝo de 21 jaroj.

Preskaŭ samtempe kun la U.K. en Varsovio okazis la Konferenco de la Mondkonfederacio de Organizaĵoj de la Instruista Profesio en Washington, U.S.A. Laŭ invito, ILEI estis reprezentita de S-ro George Falgier, kiel observanto. La duan fojon ĉi tiu privilegio estas donita al ILEI.


V. C. Nixon, Sekretariino

PRI LA 4-A INTERNACIA INFANA KONGRESETO

Aldone al nia kongreseta raporto pri la plensukcesa Infana Kongreseto en Varsovio, ni publikigas kelkajn kompletigajn informojn kaj rimarkojn, surbaze de notoj, kiujn sendis al ni unu el la kunlaborantinoj, F-ino H. Tokarzowa.

La aranĝo estis organizita de S-ino Maria Madurowicz el Varsovio, kiu zorge pripensis kaj preparis ĉion ĝis la plej malgrandaj detaloj. La infanoj mem loĝis en tre granda domo, la Instituto de Fizika Kulturo en Varsovio, en belegaj ĉambroj, kie ili loĝis po tri aŭ kvar, ĉirkaŭitaj de tre grandaj herbejoj kaj parkoj. La etuloj estis tre aktivaj dum la tuta semajno: ili faris interesajn promenadojn kaj ekskursojn per tramo, aŭtobuso, vaporŝipo, multege ludis, preparis propran spektaklon, havis balon, k.t.p. La manĝoj estis ĉiam tre bonaj kaj francaj. La impresoj travivitaj dum la kongreseta semajno estis tiom abundaj, ke la infanoj kelkfoje konfesis, ke ŝajnas al ili vivi fabelece. La pola publiko estis amase informita pri la infanaj agadoj: ĝi vidis la infanojn en kineja filmkroniko kaj en televido kaj aŭdis ilin en radio.

De la ekspozicio dum la UK en Varsovio



LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1959

Stato je la 30-a de septembro

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Hispanujo	1999	2648	132.46
2.	Belgujo	1480	1912	129.18
3.	Pollando	6635	8555	128.93
4.	Finnlando	1935	2445	126.35
5.	Jugoslavio	5690	7070	124.25
6.	Usono	2816	3210	113.99
7.	Britujo	6093	6527	107.12
8.	Svislando	1950	2035	104.35
9.	Svedujo	6420	6520	101.55
10.	Nederlando	5119	5083	99.30
11.	Francujo	7066	6961	98.51
12.	Norvegujo	1991	1905	95.68
13.	Italujo	3980	3355	84.30

14.	Danlando	2639	2160	81.85
15.	Germanujo	6951	5365	77.18
16.	Brazilo	8255	3374	40.87

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Japanujo	1150	2390	207.82
2.	Kanado	435	605	139.08
3.	Sudafriko	215	225	104.65
4.	Argentino	615	643	104.55
5.	Aŭstrujo	1360	1365	100.36
6.	Islando	270	270	100.00
7.	Izraelo	255	240	94.12
8.	Portugalujo	615	550	89.43
9.	Novzelando	878	760	86.56
10.	Urugvajo	325	255	78.46
11.	Aŭstralio	1280	1066	78.20
12.	Maroko	457	256	56.02

Ĉiu larĝe pasu 100% en la Zamenhof-Jaro !

La 4-a Kongreseto estis sub la signo: "Multe da ĝojo kaj da ludo!" La devizo estas tre taŭga, sed ĉefe por infanoj ĝis 8 aŭ 9 jaroj. Estus pli bone estonte dividi la Kongreseton en du grupojn kun du programoj: unu por geetuloj kaj alia por geknabetoj pli aĝaj. Por la malpli junaj infanoj estas oportune prepari ne nur multe da distraĵoj, sed ankaŭ laborhorojn en freŝa aero. Al la infanaj kongresetoj devas esti pli severe akceptataj nur infanoj, kiuj bone parolas Esperanton. La uzo de la Internacia Lingvo ĉe la infanoj estas la plej konvinka propagando kaj la plej rezultodona metodo de informado.

La 32-a kongreso de S.A.T.

okazis ĉijare en Dortmund, 1-7-a de aŭgusto, kaj ĝin partoprenis 550 gesperantistoj el 14 landoj. La tuta semajno havis sukceson, sed speciale la malfermo, kiu estis vere solena kun belaj muzikaĵoj de i.a. "Dortmunda popolĥoro" kaj kantoj de la "Mozart-ĥoro". La plej bonan impreson tamen faris la ĉefurbestro, SAT-ano s-ro Keuning, kiu faris sian bonvenigan paroladon senmanuskripte, elokvente parolante Esperanton.

Lunde komenciĝis la laborkunsidoj, kiuj daŭris dum la tuta semajno. Krom la laborkunsidoj okazis multaj fak-kaj frakcikunvenoj.

La adiaŭa vespero estis same modela kiel la aliaj aranĝoj, sed kun iom pli serioza programo, kaj oni disigis per la vortoj: "Ĝis revido venontjare en Aarhus, Danlando".

BELARTO

ĉu jam en via ŝranko ?

U.E.A. KANDIDATO POR NOBELPREMIO

La Sekretariaton de la I.O.K. ĵus atingis informo, ke, okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, Sveda Parlamentano, s-ro Einar Dahl proponis al la Nobel-Komitato, ke Universala Esperanto-Asocio ricevu la pacpremion.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de oktobro 1959

N-ro 320

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de septembro kaj ankaŭ por komparo je la fino de septembro 1958:

	1958	1959
Asociaj membroj	13026	16118
Individuaj membroj		
MJ	744	839
MA	4800	5256
MS	525	512
Pat.	5	7
DM	307	339
HM	47	45
JMJ	15	29
JMA	96	177
	6539	7204
	19565	23322

DELEGITOJ

Aŭstrujo

Ernstbrunn (Niederösterreich)

D : vakas.

Belgujo

Ruisbroek (Brabant) D : S-ro Maurice

Charles Monnaers, ŝtatoficisto, Gieterijstraat 82.

Sint-Pieters-Leeuw (Brabant)

D : vakas.

Ĉeĥoslovakujo

Bratislava (Slovensko) FD (lingvistiko kaj eldonaj problemoj) : D-rino

Magda Šaturova, redaktorino, Ĉsl. Armády 40.

Červená Voda (Morava) D : S-ro Josef Otta, negoczorganto, Červená Voda 165, okr. Zábřeh.

FD (kooperativismo) : La D.

FD (kuirarto) : La D.

Karviná 2-Doly D : vakas.

Praha (Čechy) FD (inventadoj kaj patentoj) : S-ro Jiří M. Havlík, patent-technikisto/disponisto, Plamínkové 12.

Rumburk (Čechy) D : S-ro Jan Zemek, em. ĉefinspektoro de fervojo, strato

Palackého 23 vilao Esperanto.

FD (fervojo) : La D.

FD (lingvoj) : La D.

FD (turismo) : La D.

Francujo

Le Mans (Sarthe) D : S-ro Bernard Michel, teknika kontrolisto, H.L.M., Courboulay-II-4439.

FD (aŭtomobilo "Renault") : La D.

Thouars (Deux-Sèvres) D : F-ino Jeanne Vazon, instruistino, 9, rue Michelet.

Germanujo

Büsum (Schleswig-Holstein) D : vakas.

FD (pedagogio) : vakas.

Dobrock-Wingst (Niedersachsen)

D : vakas.

Elze/Han (Niedersachsen) D : S-ro Joachim Giessner, fervoja oficisto, Bahnhof.

FD (fervojo) : La D.

Neustadt-Weinstr. (Rheinpfalz)

VD : S-ro Erasmus Zilles, komercisto, Hauptstrasse 39/41.

FD (turismo) : La D.

Uetersen (Schleswig-Holstein) D : S-ro Richard Pfütze, instruisto de gimnazio, Esinger Steinweg 76.

FD (pedagogio) : La D.

Islando

Kópavogur D : S-ro Baldur Ragnarsson, instruisto, Álfhólsvegur 42.

FD (literaturo) : La D.

Italujo

Sassari (Sardegna) FD (instruado) : vakas.

Izraelo

Mišmar Hašiv'a FD (vegetarismo) : vakas.

Qiryat Motzkin (Emek Zevulon) FD (filatelio) : S-ro Avri Salamon, librotenisto, P.O.B. 8.

Jugoslavio

Zrenjanin (Vojvodina) FD (instruado) : vakas.

Kameruno

Foumbot D : S-ino Suzanne Eymin, plantistino, B.P. 6.

Nederlando

Arnhem (Gelderland) FD (ŝufarado-komercio) : vakas.

Hilversum (Noord-Holland) D : vakas.

Pollando

Warszawa FD (vojoj) : S-ro Mirosław Kossakowski, inĝeniero, ul. Wandy 9 m. 34.

Svedujo

Halmstad (Halland) FD (oficistaj aferoj) : vakas.

Linköping (Östergötland) FD (elektra instalado) : vakas.

Södertälje (Södermandland) VD : vakas.

Usono

Tampa (Florida) D : vakas.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Otto, S-ro C. Stanley, West Orange, Usono.

FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo 16.758,30 gld.

F-ino Lila Teixeira 25.52 gld., Brazilo; Brita Asocio Blinda Esp. 10.60 gld., Yorks. Fed. 34.45 gld., Halifax Esp. Socy. 31.80 gld., N. R. Smith 19.30 gld., Britujo; F-ino Stas 3.85 gld., Prof. Beau 38,50 gld., S-ro Courtis 3,85 gld., Francujo, Fr. Kraus 14.44 gld., Germanujo, J. Hoekstra 1.— gld., "Busumano" 2.50

gld., N.N. en V. 75.— gld., Nanny Schothorst 1.50 gld., Nederlando.

Entute 17.020,62 gld. je 1.10.1959.

Donacu unu milonon — aŭ pli! — de viaj jaraj enspezoj por tiu ĉi gravega celo!

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj vidu la oktobran numeron.

Radio Roma. 3-XI, Tra la literaturo; 6-XI, la semajno de la mortintoj en la penso de la vivantoj; 10-XI, Italujo kaj Schiller; 13-XI, Leterkesto kaj bibliografio; 17-XI, Italaj kanzonoj en Esperanto; 20-XI, Novaĵoj el Italujo; 24-XI, Itala belarta urbo Viterbo; 27-XI, la sesa jarcento de la Itala literaturo; krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto.

Radio Zagreb. 5-XI, Mozaiko-kuriozaĵoj; 12-XI, Promeno tra Istrio, la norda Adriatiko; 19-XI, Radio-dramo : La plej granda malamiko; 26-XI, Novaĵoj el la movado kaj respondoj al la korespondantoj; 3-XII, Recenzoj pri la novaj libroj; 10-XII, Memore al la naskiĝtago de la Majstro.

ANONCETOJ

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 ŝ. 6 p. por ĉiu nokto. Prezoj malaltiĝas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. D. Bytheway, "Flat Four", 1, Warrington Crescent, LONDON W. 9, Britujo. Telefono CUNningham 4487.

Ibra Radio, kiu sendas el Tanger, Afriko, havas Esperantan programon la lastan mardon de ĉiu monato je 20.15 horo mezeŭropa tempo. Ondlongoj 32.5 m, 26.1 m kaj 20.2 m. Ibra sendas en multaj lingvoj. Aŭskultu kaj skribu en Esperanto al Ibra Radio, Stockholm 1, Svedujo.

Ĉu troviĝas inter la lertaj Esp-istoj anglalingvanoj kiuj scipovas la "Kristan Sciencon" kaj eble interesiĝus pri eldonado de Esp. traduko de ĝia instrulibro? Jam ekzistas unu traduko aprobita de plej eminentaj Esp-istoj. Interesatoj bonvolu kontakti: John F. Clewe, 1234 West 40th Place, Los Angeles 37, California, U.S.A.

Filatelistoj : Hispana humordesegnisto deziras ricevi humorajn revuojn kun ilustritaj spritaĵoj el ĉiuj landoj, en kiu ajn lingvo. Egalvaloron mi pagos per serioj de neuzitaj hispanaj poŝtmarkoj. S-ro Jaime Beltrán, str. Provenza 357, Barcelona, Hispanujo. Ĉi tiu anonceto validas ĉiam.

Vitolojn (cigaretikadojn) kaj uzitajn poŝtmarkojn serioze interŝanĝadas kvanton kontraŭ kvanto : Kooperativo "La Sabadellense" (Vitoloŝtalo kaj Filatela Rondo) Str. General Mola 99, Sabadell, Hispanujo.

Interŝanĝi memfotitajn amatorbildojn, korespondi pri fotografarto kaj pri aliaj artbranĉoj deziras Franc Vetrih, Kersnikova 6, Maribor, Jugoslavio. **25-jara fraŭlo**, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, filmkartojn

kun junuloj de tuta mondo. Certe respondos. S-ro Vladimir Kozlov, Kuĥanskaja 3, Jalta, Krimeo, Sovetunio.

Esperanto-Civito, 14B Castle Avenue, Dover, Britujo. Fondaĵo (por aĉeti domon) staras je 12 pundoj. Ŝajne pasis tra la pordejo de Britujo tiun ĉi someron nur unu Esperantisto! Anoncu vin al S-ro Dovra Soleo.

Ints Ĉaĉe tutkore animtuŝe dankas tutmondan esperantistaron pro mirindaj amikecplenaj vortoj, kiujn la esperantistaro dediĉis al li okaze de lia 50-jara esperantisteco!

Konsilon petas S-ro Mahalingam, A 178, Defence Colony, New Delhi, Hindujo, ĉu violono kun nomo "Antonius Stradivarius Cremonensis, faciebat anno 1740" estas valora.

Gesamideanoj de l' tutmondo, kiuj interesas pri la rusa lingvo aŭ jam studadas ĝin, leterkontaktigu kun rusa esperantisto : A. K. Savostianov, P.K. 466, Moskva, Centr. U.S.S.R. Li estas preta laŭeble helpi.

F-ino Aaf Tebbenhof, Narcisstraat 78, Groningen, Nederlando, petas gekorespondantojn turni sian atenton al nova adreso. Seriozaj skribaĵoj estos respondataj.

Atentu! Pri propagando kaj movado korespondus nur kun oferemaj kaj vere seriozaj aktivuloj. Kovarcz, Sverige, Lund, 212.

Ĉeĥa lernanto 15-jara, kolektanto de poŝtmarkoj, pk., unutagaj kovertoj kaj alumetetiketoj deziras korespondi kun tutmondo. Frantiček Dvořák, Albrechtice n/vet. 88, Ĉeĥoslovakio.

La Ludo-Ĉambro serĉas junulinon por mastruma laboro kaj Esperanto-instruado. Restado (vegetara) kaj poŝtmono aŭ salajro laŭ kvalifikaĵoj. Bonvolu skribi al : Karen Bjørnsby, Hartmannsvej 23, Hellerup, Kopenhago, Danlando.

En la printempo 1960 aperos belega

Memorlibro

pri la

Zamenhof - Jaro

Ĝi enhavos la plej valoran materialon publikigitan okaze de la centa datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof.

Oni trovos la nomojn: **Auld, Boulton, Collinson, Canuto, Fighiera, Francis, Isbrucker-Dirksen, Lapenna, Makkink, Nishi, Privat, Setälä, Waringhien** kaj multajn aliajn sub elstaraj artikoloj.

Ilustrita per riĉa fotomaterialo el la vivo de Zamenhof.

Elegante bindita.

MENDU ĜIN JAM NUN ĈE U.E.A.!!

Antaŭmenda prezo validonta ĝis la 1-a de februaro 1960: 9.— gld. 36 steloj.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien

kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝformato jare fr. fr. 400.- aŭ
egalvaloro

Ricevas la abonojn:

En Francujo: R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98
Marseille

Alilande: Ĉiuj Cefdelegitoj kaj landaj Perantoj
de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio:
7. Av. Léon-Gourdault
Cholsy-le Roi (Seine) Francujo.

Administracio:
5. Bd. Stalingrad
Nice (A-M)

Alproksimiĝas la monato de la DONACOJ!

Kion vi donacu?

Kion oni donacu al vi?

ĈU VI DEZIRAS
HELPI NIAJN
OFICEJAJN LABOROJN?

★

Frue pagu vian kotizon 1960!

ĈU VI DEZIRAS HELPI U.E.A.?

FARIĜU MEMBRO-SUBTENANTO!

DANKON

Grupestroj!!

Bonvolu sendi al la Centra Oficejo de U.E.A. antaŭ la 1-a de decembro 1959 informojn pri nomo, adreso kaj kunvenhoroj de via grupo por la listo en Jarlibro 1960 (vidu p. 484 k.s. en Jarlibro 1959).

Prezo: unu dekono de jarkotizo MA.

**VARBU REKLAMOJN
POR JARLIBRO 1960!**

Partoprenu nian konkurson!

(Vidu dorsan flankon de la sept. no. de tiu ĉi revuo)

POR LA DECEMBRAJ SOLENAĴOJ:

GRAVURBILDO DE ZAMENHOF,

21 × 27 cm de Reto Rossetti, (vidu
Dec. no. 1958) tre taŭga por klubejoj,
kunvenejoj ktp. 0,75 gld.; 3 steloj

FOTO DE ZAMENHOF,

poŝtkarto 0,20 gld.; 0,80 steloj.
Ĉion liveras la C.O. de U.E.A.

Ĉu interesas vin la folkloro de Nederlando?

Aĉetu la ĉarmegan libreton

Sankta Nikolao en Nederlando

Bele ilustrita rakonto pri tiu granda festo de la bonkora sanktulo.

Prezo: 1,50 gld., 6 steloj.

LIBROJN!

Famo ne flugas, se kaŭzo ne estas!

Kvaropo
La bapto de caro Vladimir
Koko krias jam!
La infana raso
kvar titoloj de **STAFETO** jam elĉerpitaj!

Ankoraŭ haveblaj (sed de kelkaj nur ne multaj pecoj) :

Reto Rossetti : El la maniko. 224 paĝoj

Marjorie Boulton : Kontralte. 288 paĝoj

Gaston Waringhien : Eseoj I. Beletro. 246 paĝoj

En traduko de

K. Kalocsay kaj **G. Waringhien** :

La floroj de l'malbono (Ch. Baudelaire) 400 paĝoj

J. D. Applebaum : Jozefo. 120 paĝoj

Paul Neergaard : La vivo de la plantoj. 128 paĝoj

Julio Baghy : Sonĝe sub pomarbo. 232 paĝoj

William Auld (Redaktinto) : **Esperanta Antologio. Poemoj 1887—1957.**
648 paĝoj

Marjorie Boulton : Eroj kaj aliaj poemoj. 368 paĝoj

Gaston Waringhien : Lingvo kaj Vivo. Esperantologiaj eseoj.
452 paĝoj

Lastaj titoloj :

Tibor Sekelj : Nepalo malfermas la pordon. Ĉ. 300 paĝoj

Leander Tell : La bela subtera mondo. Ĉ. 150 paĝoj

Baldur Ragnarsson : Ŝtupoj sen nomo. Ĉ. 120 paĝoj

Reto Rossetti : Pinta krajono. Ĉ. 120 paĝoj

Aliaj titoloj baldaŭ anoncotaj!

Al saĝulo sufiĉas aludo!

La librojn liveras la eldonisto, UEA kaj ĉiuj libro-servoj de la Movado

KUNHELPU PLUPORTI LA TORĈON!

Libro, kiun
devas havigi
ĉiu esperantisto

R e t o r i k o

KUN APARTA KONSIDERO AL ESPERANTLINGVA PAROLARTO

DUA ELDONO

DU PARTOJ : I. LINGVO — II. RETORIKO

Verkita originale en la Internacia Lingvo de Prof. D-ro Ivo Lapenna



"En ne multaj naciaj literaturoj estas trovebla libro tiel science redaktita, tiel oportune utiligebla, tiel pense riĉiga, kiel ĉi tiu verko". Prof. G. Waringhien en la Antaŭparolo al la Dua Eldono, Rotterdam, 1958.

Pri la aŭtoro :

"Kiu aŭdacas eldoni fakan verkon, devas esti spertulo en tiu fako. D-ro Ivo Lapenna estas majstro en la parolarto; ĉiu kiu aŭdis lin paroladi, ĉu antaŭ grava kongreso aŭ en intima rondo, ĉu pri serioza scienca temo aŭ pri bagatela subjekto, lasis sin logi de tiu sonora kaj simpatia voĉo, kiu kondukas la aŭdantaron per koncizaj argumentoj al klara konkludo". "Dia Regno", n-ro 3/1959.

"Traleginte la tutan libron, ĉiu plene konvinkigis pri tio, ke la mondfama elokventa oratoreco de Ivo Lapenna estas nutrita ne nur per lia genio de la naturo donacita, sed ankaŭ per lia profunda kono pri retorikaj principoj kaj reguloj kaj multaj lingvistikaj fakoj. Li plie posedas la lingvon en mirinde alta grado : la esprimo de pensoj estas plue libera, dum la elekto de vortoj — precize adekvata. Lia stilo estas elegante simpla". "Oomoto", n-ro 1-2/1959.

"Majstra oratoro majstre skribas ne nur pri la retoriko mem, sed pri fakoj lingvistikaj. Ĉi tiu literatura trezoro enhavas la antaŭparolon al la Unua Eldono de Reto Rossetti, kune kun nova Antaŭparolo de G. Waringhien". "New Zealand Esperantist", Nov.-Dec./1958.

Por kompreni pli bone la esencon de la lingvo kaj la arton argumenti por justa afero :

Por lertaj esperantistoj dezirantaj ĝui elegantan, vere internacian stilon :

Por komencantoj strebantaj altigi sian lingvonivelon :
Por superaj kursoj kaj studrondoj, por seminarioj kaj prelegoj :

Por donacoj al geamikoj kaj al laborantoj por la Internacia Lingvo, precipe en landoj, el kiuj ĝi ne estas mendebla :

"Kun grandega ĝojo kaj emocio ni foliumadis vian belegforman kaj tre valoran verkon. Mi nun ankoraŭ ne povas imagi kiom ĝi signifos por mia lingva evoluo.. La grupo treege ĝojas pro via verko kaj je ĉiu kunveno ni legas ĝin komune kaj poste la legita parto estas priparolata...." el letero de la Esperanto-Grupo en Pápa, Hungarujo. "Mi ne nur tralegis, sed efektive bone studis kiel abocon vian instruplenan libron — Retoriko — kio tre utilas al mi en mia ofta laboro same tiel por Esperanto (ĉefe), kiel ankaŭ en mia ofico" (el letero de A. P. D. Taŝkent, Mezazio). "Mi legas vian libron kaj ne povas ne esprimi al vi mian dankon pro la sentoj, kiujn kaŭzas la legado. Tio estas mirinda.

Pri la Unua Parto (Lingvo) :

"El ĉi tiu parto oni povas ĉerpi bonegan materialon por nacilingvaj broŝuroj pri la Internacia Lingvo eldonotaj okaze de la Zamenhof-Jaro; precipe el la jenaj partoj : pp. 59-71, 83-90, 100-110. La aŭtoro lerte frakasas multajn pseŭdosciencajn stultaĵojn, kiujn laikoj kaj lingvistoj kutimis kaj ankoraŭ kutimas elbuŝigi kaj surpaperigi kvazaŭ argumentojn kontraŭ la Lingvo Internacia". D-ro W. P. Roelofs en "Scienca Revuo", n-ro 2-3/1959.

"Resume, trastudinte la Unuan Parton, ĉiu esperantisto sentas sin prava kaj forta kiel batalanto por nia afero. Tial mi rekomendas ĝin kiel studlibron al ĉiu esperantisto, precipe al nia juna generacio". P. Zlatnar en "Jugoslavia Esperantisto", Nov.-Dec. 1958.

Pri la Dua Parto (Retoriko) :

"La Dua Parto estas dediĉita al retoriko kaj kiu povas pli bone verki pri ĉi tiu arto ol la majstro inter la oratoroj ? La aŭtoro ĝisfunde pritraktas ĉi tiun temon atentigante pri la plej simplaj faktoj, kiuj povas influi la esprimkapablon kaj la rilatojn inter la publiko kaj la parolanto". F.W. en "Nederlanda Esperantisto".

Retoriko
Retoriko
Retoriko
Retoriko
Retoriko

Mi neniam sentis ion similan pli frue...." (el letero de V.Z., studento en la Universitato de Moskvo).

Por ĉiu esperantisto: RETORIKO !

La Dua Eldono estas reverkita kaj kompletigita. Sed, kion fari, se oni jam posedas la unuan eldonon ? "Facile : oni donacas tiun al la loka Biblioteko kaj aĉetas la novan".

D. B. Gregor en "The British Esperantist"

Prezo : 11.- gld., 44 steloj bindita; 9.- gld., 36 steloj broŝurita.

Mendu ĉe U.E.A. aŭ ĉe la aŭtoro.



Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam